

ORIENTA NOV-SPIRITO

OOMOTO



Organo de Oomoto-Movado kaj de U.H.A.

Jaro VIII Decembro 1932 N-ro 12 (88)

OOMOTO-PROPAGANDA OFICEJO

KAMEOKA KIOTO-HU JAPANUJO



Angelino, desegnita de la Majstro, O. Deguči.



Generalo Chang Haipeng vizitis la Majstron en Kameoka. (Referencu "Heroldo de Oomoto".)



Japanana ŝintoisma templo.

En ĝia teritorio estas nepre starigitaj Torii (pordego) kaj ŝtonlanternoj.



俗5.炭賣リ

Moro de la koreo — karbovendisto.
(Sendita de nia raportanto J. Nišimura en Manĉukuo.)

O O M O T O

MONATA ORGANO DE OOMOTO-MOVADO
KAJ DE UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

JARO VIII DECEMBRO 1932 Nro. 12 (88)

Ĉefredaktoro: Jasuo SAKURAI — Redaktoro: Jozefo MAJOR

Por ĉiu artikolo respondas la subskribinto. Ĉiu abonanto rajtas enpresigi
du senpagajn anoncetojn poĵare. Pri kotizoj legu lastan paĝon.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio :
Oomoto-Propaganda Oficejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Kvintesenco de Oomoto :

Maksimoj :

1. Observu la veran aspekton de la Universo kaj konsideru, ke ĝi respegulas la **Korpon de Dio**.
2. Konsideru la seneraran funkciadon de la Universo kaj rekonu la **Forton de Dio**.
3. Konsideru la koron de la vivantaĵoj kaj komprenu ke ĝi estas koncipita de la **Animo de Dio**.

Ĉefinstruo :

Dio estas spirito loĝanta en ĉio de la Universo, kaj homo estas la reganto de la mondo. Kie unuigas Dio kaj homo, tie ekestigas senlimaj fortoj kaj aŭtoritateco.

Devizoj :

1. Harmonio inter Dio kaj homaro.
2. Instruo pri Dia Vero.
3. Fundamenta moralo.
4. Sankta karaktero de la misio.

Principoj :

1. PURECO de animo kaj korpo.
2. UNUIĜO inter klasoj de la socio.
3. OPTIMISMO pri la arango de Dio.
4. PROGRESEMO por la socia plibonigo.

Dio estas eterna kaj Li estas la fonto de ĉiu vivo en la Universo. Li spiradas fajran kaj akvan spirojn tra la eterneco. Dio, kiu spiradas tiajn spirojn, donas lumon kaj varmon al la naturo. La aero, kiun spiras la Suno ne estas la sama, kiun spiras la Luno: same la aero spirata de la homo estas alia ol tiu spirata de la Sinjoro. Ĝenerale parolante, la aero spirata de la estaĵoj estas tute diversa. Ni do vidas, ke la fenomenoj de la reala vivo estas aliaj ol tiuj de la spirita mondo. Tamen rigardante de ekstere, la formoj de la spirita mondo estas treege similaj al tiuj de la reala mondo, ĉar pro dia volo, ĉio, kio troviĝas en la spirita mondo, ekzakte respeguliĝas en la reala mondo.

La regno de la Ĉielo estas farata de la dia karaktero de la Sinjoro. En ĝi troviĝas diversaj gradoj por la ĉielirantoj: kompletaj virtuloj, tri-, du-, unu-virtuloj. La dia karaktero de la Sinjoro vidiĝas nesame al ĉiuj rigardantoj: tio dependas de la klaso, en kiu la observanto troviĝas. Sed tiuj-ĉi diversaj bildoj de la dieco ne signifas tion, ke Li ŝanĝiĝas: kontraŭe. Dio estas rimarkita diversmaniere kaj la vizio de Dio dependas de la grado de la virteco de la rigardanta spirito. Efektive homo havas konceptojn pri virteco komparante ĉion kaj ĉiun al si mem.

La ĉielanoj formas do diversajn grupojn, pli malpli grandajn kaj altajn, laŭ la grado de la virteco de la grupanoj. Tiu, kiu havas plej multe da virto, do tiu, kiu pleje amas Dion, eniras en la plej altan grupon kaj li ĝuas la plej feliĉan vivon. Al liaj okuloj ŝajnas la Sinjoro la plej bela kaj la plej nobla.

Pekplenaj kaj senkredemaj spiritoj, kiuj estas ekster la ĉielregno, ne povas toleri la vidon de la Sinjoro. Li aperas al ili kvazaŭ terura satano kaj ili timas Lin.

Dio aspektas al la ĉielanoj kiel angelo, sed tamen estas granda diferenco inter angelo kaj Dio. La korpo de Dio estas brilega pro la multaj virtoj, kiuj troviĝas en ĝi.

Homoj posedas en si unu spiriton kaj kvar karakterojn, kiuj estas: ĉefspirito, karakteroj de kuraĝeco, intimeco,

sageco kaj amemo. La ĉefspirito regas tiujn-ĉi kvar karakterojn. Kiam la karakteroj bone funkcias por bono, amo kaj vero, tiam la stato de la homo estas komplete virta: homoj de tia animo rekte sin levigas en la Ĉielon post la morto de la korpo. Sed tiuj, en kiuj nur tri el la nomitaj karakteroj funkcias bone, estas la trivirtuloj kaj tiuj, en kiuj nur du aŭ nur unu el la karakteroj funkcias bone, estas, respektive, la du- aŭ unuvirtuloj. Ili okupas pli malpli altan pozicion en la Ĉiela Regno ĝuste laŭ tiu-ĉi kriterio. Fine tiuj, kiuj eĉ ne atingas la gradon de unuvirteco, vagas en la Intera Regiono.

Tiuj, kiuj estas ekstreme malbonaj aŭ nekredemaj, malamemaj kaj malvirtaj, tiuj enfalas en Inferon, konvenan al siaj pekoj kaj suferadas laŭ merito.

Unuigo de Dio kaj Homo

D. Uĉimaru

Kriterio de bono kaj malbono: Bono kaj malbono ne estas definitivaj. Laŭ la respektiva vidpunkto de si mem, de familio, de nacio, de gento... la kriterio de bono kaj malbono nature diferencigas. Ke io, estante unu sama afero, ĝi estas bono por A, dum ĝi kaŭzas malbonon por B, tia fakto tre ofte okazas en la homa ĉiutaga vivado. Kiel ekzemple, mortigi homon estas malbono, sed tio fariĝas kontraŭe bono dum milito el la vidpunkto de iu nacio. Pro tio, estas malfacile tuj kompreni, kio estas bono kaj kio malbono, en efektiveco. Laŭ la malsameco de vidpunkto, de tempo, de loko ankaŭ la grado de bono kaj malbono respektive varias: ili fariĝas ĉu grandaj kaj malgrandaj, gravaj aŭ malgravaj. Pri tiu ĉi punkto la Majstro O. Deguĉi skribas en sia verko « Fundamento de Vojo »:

« Bono estas kondukti pro publika bono kaj malbono estas kondukti pro sola memamo. Faro kun justo kaj virto estas bono kaj senfaro kun maljusto kaj malvirto estas malbono. »

Sed tamen homa ago ĉiam havas interrilaton rektan kaj nerektan en ambaŭ flankoj publika kaj individua. Tial la homo ne kapablas vivi nur bazite sur absoluta

plejeble klopodas ellabori eĉ unu tagon pli frue sian landon por bela nacio kaj paradizo de la mondo. Por tio necesas harmonia kunlaboro de Japanujo kaj Manĉukuo, bazata sur bonamo, mi pensas. Feliĉe, antaŭ kelkaj jaroj via Oomoto (Universala Homama Asocio) kaj nia Tao-Juan (Universala Ruĝsvastika Asocio) tute unuigis spirite. De tiam nia harmonia kunlaboro pli kaj pli vigligas ĉie kaj nun la atmosfero de bonamo etendiĝas en preskaŭ nia tuta lando. Tiujn ĉi niajn ideon kaj religikredon ni devas semi ankaŭ en nord- mez- kaj sudĉinujo kaj forte manpremi tri landoj Japanujo, Manĉukuo kaj Ĉinujo. Sur tiu elkora manpremo ekfloros la orienta paco kaj samtempe la mondopaco.

Depost la alveno al Japanujo mi estas fervore bonvenigitaj de viaj multaj samideanoj en Mozi, Kobe, Osaka, Kioto, Kameoka, Nagoja, Tokio, kaj aliaj lokoj. Mi tre dankas por via granda gastameco.

La Mondo staras sur Nocio

D. Hidemaru

◆ Se oni metas ardantajn karbojn aparte po unu sur cindro, la karboj ruĝe brulantaj baldaŭ estingiĝos. Kaj tamen, se oni kolektas unuloke tiel malgrandajn fajrerojn, kiujn oni ne povas pinĉi eĉ per pinĉiloj, dum kelka tempo ili brulas kun forta varmeco.

◆ En vera senco, tiu ĉi mondo staras sur noĉio de la homoj. La feliĉo kaj la paco de la mondo efektiviĝos nur kiam la animoj de la homaro (animo estas esenco de la nocio) estos en plena harmonio. Ĉiuj animoj estas, por tiel diri, fajroj de karboj; kiam ili disiĝas inter si, ilia forto dividita estas malgranda; kaj tamen, kiam ili unuigas, fariĝas granda, eĉ se individuo estas malgranda.

◆ Se oni volas harmoniigi kun aliaj, antaŭ ĉio oni devas interkompreniĝi kun ili. Kaj tiam oni komprenas

reciproke siajn cirkonstancojn kaj povas komuniki inter si sur neŭtrala punkto. Tio ĉi necesas ne nur inter homoj, sed ankaŭ inter ili kaj animaloj ktp. Por interkompreniĝi, oni devas esti akceptemaj kaj intimaj, kaj klopodi sin doni, evitante difekti unu la alian.

◆ Bonkoreco kaj intimeco al io ajn, tio mem verdire, estas la tuta trezoro de la homoj. Kaj kiam oni faras ian entreprenon, elĉerpante ĉi tiun trezoron, oni ja povas plenumi mirindan laboron kaj ricevi reciproke grandajn profiton kaj feliĉon.

◆ Semi semojn sur kampo, zorgi ilin kaj rikolti. Tio estas laboro de ne nur la terkulturistoj. La granda universo mem estas ja grandioza kampo, sur kiu ĉiuj, laŭ sia cirkonstanco, semas iusenkan semon, kulturas ĝin kaj gajnas rikolton videblan aŭ nevideblan.

◆ Oni havas la okulojn, kiuj estas organoj por vidi, kaj do nepre devas troviĝi objektoj vidataj de la okuloj. Kvankam oni havas la orelojn, se en la mondo ne ekzistus sono, la oreloj estus tute senutilaj por la homoj. Se oni sentas soifon, certe troviĝas tio, kio forigas soifon. Ekzistas nur la sento de soifo, kaj tamen se ne estus afero ĝin kvietigi, senti soifon mem estas tute sensignife.

Ĉiuj sopiras Eternon kaj deziras Senfinecon. Do Interno kaj Senfineco devas ekzisti en la mondo. Deziro de la koro signifas, ke ekster la koro troviĝas io, kio kontentigas ĝin.

◆ Spiritaj aferoj ordinare ne tuŝas al la okuloj aŭ oreloj, sed sentiĝas al la koro. Tial se la homoj ĉiam observas bone sian koron, kvankam nebule ili sciigas, ke ilia koro nun komunikas kun ĉielregna atmosfero, aŭ kun infera.

Oni pensas, ke la kaŭzo de moviĝo de sentimento ĉiam estas ekstere. Tamen tio estas malprofunda.

(Eljapanigis: K. Vivlong)

Pri Superstiĉoj

Jozefo Major

Kiam ni ekzamenas la longan historion de la homa kulturo, ni vidas ke la «racia» periodo estas kompare malgranda kaj la plej granda parto de la vojo estas nekulturita. Efektive, homoj ekzistis treege longe antaŭ la komenciĝo de civilizo. Ne estas do mirinde, ke nunaj homoj agas ofte mallogike kaj malracie — la kontraŭo estus mirindaĵo. Tiuj homoj, kiuj plej mokas pri superstiĉoj fariĝas en specialaj okazoj plej superstiĉemaj. Certe ni ne pretendas, ke superstiĉoj estas dezirindaj kaj bonaj — ni nur asertas, ke kiam oni volas neglekti ilin, oni agas simile al struto, kiu kaŝas sian kapon en sablo... pensante eviti danĝeron. Tie ĉi ni komparas kelkajn superstiĉojn de la Oriento al tiuj de la Okcidento.

En la Okcidento, vendredo kaj la 13a tago de l' monato estas konsiderataj malfeliĉaj — la koincido de ambaŭ sugestas do kataklismon. Nigra kato trairanta la vojon antaŭ iu persono signifas, ke malfeliĉo okazos dum la promenado — aŭ reveno, se oni timus daŭrigi. Multaj eŭropanoj ne ŝatas trairi sub apogita ŝtuparo, nek ellitiĝi per maldekstra piedo. Kontraŭe, posedo de «amuletoj» ŝirmas kontraŭ danĝero. Eŭropanoj kaj negroj ofte kredas al tia efiko de posedata kunikla piedo., trovita sur la vojo hufofero aŭ kvarfolia «trifolio» (Pasante, mi rimarkas, ke tiaj vortoj kiel «trifolio» ne apartenas al la plej trafaj en la esperanta vortaro).

Japanoj ĝenerale konsideras Eŭropanojn superstiĉema popolo... sed kompreneble ili ankaŭ havas grandan nombron da superstiĉoj. Kiam tiaj japanoj translokiĝas, ili zorge elektas domon, kiu situigas laŭ ĝusta direkto. Por tio ofte necesas konsulti «magiiston». Ĝenerale oni kredas, ke domo ne devas turniĝi al nordoriento, kie estas «Kimon» — la Inferpordego. La translokiĝo krome ne devas okazi je «malfeliĉa» tago kaj tiaj tagoj estas tre multnombraj. Por eltrovi feliĉan tagon necesas konsulti malnovmodan kalendaron, kiu montras signojn de la zodiako. Ĉe g edziĝoj, superstiĉemaj japanoj devas atenti pri diversaj aferoj. Nature, la jaro devas esti feliĉa. Ĉiu jaro havas nomon de besto. 1932 estas jaro de simio, ekzemple. Tiu ĉi jaro estas tradicie malfeliĉa — oni do ne povas geedziĝi antaŭ la nova jaro. La jaro de l' tigo estas same malbona — ĉar oni timas, ke fraŭlinoj edziniĝantaj en tia jaro ba daŭ forkuros — simile al tigrinoj...

Diversaj superstiĉoj de ambaŭ okcidento kaj oriento kelkfoje koin-

cidas. La krio de l' korvo estas malfeliĉa eble en la tuta mondo pro ideo-asocio (korvoj kolektiĝas ĉe kadavroj). Same estas pri la krio de l' strigo, plorbojo de hundo, ĝemkrio de kortbirdoj, ktp. Songoj ankaŭ havas magian signifon — laŭ kredo de multaj kaj povas esti klarigataj per psikoanalizo. Falo de haroj aŭ dento ĝenerale signifas morton de parenco en plej diversaj landoj — pro simpla ideo-asocio. En Japanujo oni ne devas dormi turnante la kapon al la nordo, ĉar tio ofendas la diojn.

Superstiĉoj povas grandiĝi ĝis malsano kaj krimo. Antaŭ unu jaro iu mortigis sian propran infanon kaj poste la polico komprenis, ke la motivo estis superstiĉa: la cindroj de mortigita infano estas supozataj kuraci lepron kaj la edzino estis leprulino... Feliĉe tiaj kazoj estas tre maloftaj, tamen ili atentigas niu sufiĉe pro la granda danĝero de superstiĉoj. Kvankam ekzistas bonaj superstiĉoj, estas dezirinde persvadi la homojn, ke la amoplena Dio de la granda Universo ne povas sin amuzi terurigante infanojn per fantomoj kaj punante senkul-pulojn pro laŭsuperstiĉaj kulpoj. Necesas, ke la mondo eksciis la instruon de Majstro Deguĉi: Facile estas ĉieliri, malfacile estas inferiri» — kaj ne kontraŭe.

Miraklaj resanigoj per “miteŝiro” en Eŭropo

Ni eltiras la sekvajn el letero ricevita de nia ĉekoslovaka korespondanto, s-ino S. Ciperá, Plsen:

... mi devas denove danki al vi pro via afabla donaco de sankta « miteŝiro » (kulerforma anstataŭ-mano de la majstro Deguĉi el ligno, la Red.), per kiu mi jam sanigis kelkajn homojn... Plue mi petas, bonvolu sciigi al mi, ĉu mi povas sanigi per ĝi ankaŭ min mem (Jes, kondiĉe ke vi tion faru sen memamo, la Red.)... Mi nun komencis sanigi homon, kiu suferas je la gamboj. La karno ĉe liaj kruroj malmultiĝas; li malfacile marŝas ĉar la kruroj estas malfortaj. Tri foje mi aplikis la « miteŝiro » kaj li ĉiam sentis varman fluon tra la korpo ĉe tia okazo. Mi daŭrigos la aplikadon....

... Ĉu mi povus sanigi en malproksimon, nur en pensoj? (Jes, la Red.) ...

Oni vidos do el la supra fragmento, ke la kuracmetodo per « miteŝiro » jam estas praktikata ankaŭ en Eŭropo.

Japanana Anekdoto: HAGOROMO

(Robo el plumoj de Anĝelo)

Antaŭ longa tempo, unu fiŝisto iris tra la pinarbejo Miho (proksima al malsupro de la monto Huĝi) dirante « Kiel serene hodiaŭ estas! »

La suno tre bone brilis, kaj la monto Huĝi aspektis ankoraŭ pli bele, ol ordinare. La vento estis kvietita kaj la ondoj senbrujaj. La malproksima maro estis vualita de nebuleto, kaj la ĉielo kaj la maro vidigis unu. La pejzaĝo estis tiel bela, ke la fiŝisto rigardis la maron tute ravita. Jen, de ie venis dolĉa aromo, li rigardis supren kaj vidis ion belan, pendantan sur pinarbo. Kiam li proksimiĝis ĝin, li trovis ke ĝi estas tre bela vesto, kian neniam li vidis antaŭe.

« Ho, bonaĵo! mi ĝin prenu kaj posedu kiel trezoron de mia hejmo. »

Tion dirante, li volis foriri, ĝin portante, kiam venis unu belulino, kian li neniam vidis. Kaj ŝi diris:

« Tio estas mia vesto, sinjoro. »

« Ne, ĝin mi trovis nun tie ĉi. Mi volas ĝin porti hejmen kaj posedi kiel mian trezoron. »

« Ne, ĝi estas anĝela Hagoromo, kiu neniom utilas al homo. »

« Kiam ĝi estas Hagoromo de anĝelo, mi des pli ne povas ĝin redoni. Mi faras ĝin trezoro de la lando. »

« Sen ĝi mi ne povas reiri supren al la ĉielo. Do bonvolu redoni ĝin, mi elkoru petas vin. »

La fiŝisto ne volis redoni ĝin. La anĝelino malkuraĝe suprenrigardis la ĉielon kun okuloj malsekaj de larmoj. La fiŝisto eksentis kompaton.

« Estas tre kompatinde; mi ĝin redonos al vi. Kompense por tio, bonvolu vi montri al mi dancon de anĝelo. »

« Dank' al via bonkoreco, mi povas reiri al la ĉielo. Kiel dankesprimo, mi ludos dancon. Bonvolu redoni la Hagoromon. »

« Ne, ne. Se mi nun redonos ĝin, vi ne dancos kaj

tuj supreniros la ĉielon. »

« Ne! neniam anĝelo mensogas. »

« Oh! hontindaĵon mi diris... »

Kiam la fiŝisto redonis Hagoromon, la anĝelino surmetis ĝin kaj komencis danci. La manikoj de Hagoromo malpeze flirtis en la vento kaj ĝia koloro rebrilis en la sunradioj. Kiam la fiŝisto ravite rigardis, la anĝelino supreniris pli kaj pli alten super la pinarbejo, kaj eniris fine en la nebuleton, kiu kovrante la tutan ĉielon troviĝis eĉ pli alte ol la monto Huĵi.

(El la tria-klasa legolibro de la elementa lernejo, tradukis S. Seto.)

ANIMO KAJ MORTO

Ho vi, multekosta fajrero de Dio,
Anim', loĝantino de l' korp' pereema,
Mort' vin liberigas el vivo malpia!
Forflugu do ĝoje el mond' sendankema!

Forlasi la ŝargon de l' homa mizero
Ĉu estas ja morto? Ne! estas libero!

En ondoj de lumo eknagas mi jam,
La spac' antaŭ mi pligrandiĝas. La tero
Nun ekmalaperas, kaj helega flam'
Kondukas min rekte al land' de l' espero.

Sed kion mi aŭdas? Ekgemojn, ploregojn.
Parencoj, vi ploras kun ĉagren' mian morton,
Amikoj, kompatas vi nun mian sorton,
Vi ploras!... Forgesis mi jam suferegojn
De l' vivo, kaj mia anim' ricevinte la benon
De sia kreinto eniris la dian havenon!

Simon Frantz, Paris

RAKONTOJ EL LA SPIRITA MONDO

DE ONISABRO DEGUČI

67-a Volumo Ĉapitro 22

Sopiro al Amo

La Princo fermis sin en sia palaco. Tage kaj nokte liaj palpebroj absorbigis en la portreton de f-ino Svarle, pendigita sur la muro. La tutan tempon li impetis kun vervo al ŝia bela vizago, lia koro kuris foren al la idilia kabano en Asakura montaro. Lin forte doloris la foresto de Alina, lia sola konsolanto, kiu estis submetata al tri-dektaga mallibereco. La Princo apenaŭ sin distris de nigra humoro per la vibriga portreto.

La tago venis, li murmuris al si kun splena mieno, kiam Alina nun reliberigos. Nun envenis la vasalo Haltin solene.

Haltin: « Via Ekscelenca Moŝto! Al mi estas tre granda plezuro vidi vin ĉiam en bona sano. »

Princo: « Ho, Haltin. Venu proksimen kaj rakontu al mi ian amuzigan novaĵon. Mi aŭdas ke vi lastatempe vin riskis por deteni Samori de sovaĝa ago en la Kastelo. Mi laŭdas vin. »

Haltin: « Mi estas malinda je via laŭdo, Mia Ekscelenca Moŝto. Mi hontas pro via komplimento. Mi faris nur kion mi devis fari... Mi jam delonge deziris vin viziti kaj tamen vole nevole tio prokrastigis ĝis hodiaŭ pro la timo, ke mi multe vin ĝenus per mia vizito. Nu pardonu, Mia Moŝto, sed al mi ŝajnas ke vi ege favoras la paĝion, filon de Samori — tio estas bona, sed taman estas dangere tro inkliniĝi, ekskluzive konfidi al nur sola persono. Tian aferon mi apenaŭ bezonas diri antaŭ la sagaca Princa Moŝto. Do mi petas al vi, afable akceptu egale ĉiujn aliajn. »

Princo: « Ha, ha, ha... Svarmas vasaloj sed mankas

vasalo kiu plaĉas al mi. Mi vere sentas solecon, sed almenaŭ Alina min konsolas. Kiel do vi pensas pri la personeco de Alina? Diru maldiskrete kion vi observis.»

Haltin: « Pardonu, Mia Ekscelenca Moŝto! Mi ne kuraĝas pritaksi la favoraton de la Princa Moŝto. Bonvolu min lasi elturnigi de tia senprudenta afero.»

Princo: « Senbezone elturnigi, nek honti. Montru ĉion kion vi pensas. Mi aŭskultos ĉiun sekreton pri Alina kaj se vi pravigos vin pri via opinio, mi ankaŭ do rifuzos lin.»

Haltin: « Ho! Ĝuste! Sagaca ja estas Mia Princa Moŝto. Vivu nia patrolando Tarahan. Kia ĝojo! Se mi darfus, mi malkaŝos ĉion. Mia Ekscelenca Moŝto! La paĝio Alina estas aroganta demono, kiu emas kaprici pri bagatelaj ideoj kaj strangaj kulturoj. La dekadenco de nia lando kaj tiu de la reĝfamilio, ĉio ĉi estas tute eksterlia zorgo. Se vi plu kroĉus vian konfidon al tia mallojalulo, fine vin renkontos katastrofo. Fidu al mi kaj akceptu mian sinceran admonon, ja por la feliĉo de la reĝa familio kaj la lando. Kun tiu ĉi konsilo mi venis al vi hodiaŭ.»

Princo: « Hum! Alina ŝajnas al vi ĉarlatano? Maltrafe. Vi bedaŭrinde supozas, ke la pioniro, iniciatema laŭ la tempo, detruas la reĝlandon, ĉu ne? En la moderna epoko, oni jam ne povas subpremi la popolon per absolutisma reĝimo. Se ne per la reĝimo laŭtempa, la lando pereos, ĉu vi vidas? »

Haltin: « Ŝajne vi estas prava, sed memoru, mi petas, ke atribuiĝas ja al li la tuta kaŭzo de ĉagrenoj de Lia Reĝa Moŝto kaj vasaloj. Li azeno incitis forlogi la Princon en nekonatan krudan monton, kie laŭdire tondras blekoj, kaj suferigis lin en dornejo. Mi tre bedaŭras ke vi akceptas nur tiun paĝion. Bonvolu pripensi tion, Mia Ekscelenca Moŝto.»

Princo: « Domage! Kiel sufoke ŝvarmas la parazitoj, kiuj mordas la Kastelon... mia patro, ekzemple, Samori, Umori kaj... vi. Haltin! mi ne ŝatas aŭskulti tian aferon. Cetere mi konsilas al vi, ke vi blinde kroĉigu al la granitoj... ke vi akcelu la pereigon de nia lando.»

Haltin: « Kion mi aŭdas? Mi ne povas kredi miajn orelojn! Ke mi akcelu la pereigon de la lando?? Ho, ve!

Mi tre bedaŭras. Anstataŭ min kompati, vi min petolas. Vi transiris la limon de prudento, ĉu? Mi estas ofendata de viaj vortoj. »

Princo : « Ha, ha . . . Ofendata ne estas nur vi, sed mi ankaŭ same. Mi cerbumas ĉiutage, ja ĉiamaniere por sekurigi la tutan popolon en paca kaj feliĉa vivo, venigi la ĉielregnon surtere, dum ĉiuj subuloj patose flatlogas al potenculoj kaj riĉuloj kaj okulumas al siaj propraj laŭroj de gloro kaj famo. Lojaleco kaj fideleco estas spicoj sur iliaj pretekstoj. Ili estas sklavoj de si mem pro memamo. Malbenata estas Tarahan lando, je la dispono de tiaj ĉarlatanoj ! Nek amikon, nek gvidanton mi havas. Pro soleco mi dronas en spleno. Dronanto kaptas eĉ pajlon kaj ĝuste mi kaptis Alina, kiel bonan amikon, kiu plej bone min komprenas. Ni do duope kunlaboras en simpatio por sekurigi la landon. Malakcepti Alina implikas la forigon de mi mem. Se vi malgraŭ tio volas rifuzi lin, do bone, vi agu laŭ via bontrovo. »

Haltin : « Mi ĵus aŭdis de vi, ke inter la vasaloj troviĝas nek unu, kiu almenaŭ estas patriota, ke ĉiuj estas senescepte kvazaŭ sklavoj de memamo, sed tio estas trograndigo. Via Ekscelenca Moŝto, mi ja indignas kaj zorgas pri la estonteco de nia lando kaj jen ni laboregas ĉiutage. Bonvolu nin kompati, mi petas. »

Princo : « Via patriotismo estas sinonimo al memprotekto. Nur imagu ! Kiam malamikoj atakus kontraŭ nia lando kaj la lando preskaŭ detruigus kiel . . . a lando, neniu plu kuragus resti ĉe sia posteno por subteni min. La detruigo de nia lando inkluzivas la vian. Tion timante, vi pledas por vi per konvenaj vortoj de lojaleco kaj fideleco. »

Ĝuste tiam revenis Alina kun triumfanta mieno post tridektaga foresto.

Princo : « Halo ! Alina ! Bonrevenon ! Akceptu mian simpatian pro via tridektaga mallibereco. »

Alina genuis antaŭ la Princo.

Alina : « Mi estas tre ĝoja vidi vin en bona sano, mia princa moŝto. Dum mia restado en la ĉambro, mi profitis la bonan ŝancon interŝangi opiniojn kun mia patro. Novaĵo ! Estas bone kaj feliĉe, ke mia patro, kiu estis tiel granita, pli kaj pli rezignis antaŭ mi la rigorecon, konvertiĝis kaj pentis pri sia ĝisnuna sinteno. Li tute

reviviĝis en la nuna tempo. Li jam montris sian simpatian al vi. Cetere li promesis al mi, ke li neniam sin trudos al la aferoj de la Princa Moŝto. »

Princo : « Ha, ha, ha, ha, . . . Ĉu vere ! Bone, bone, bonege ! Granda rikolto ! Jen alia obstinulo tie ĉi. Li venis al mi kun sensencaj paroloj kaj ĵus ĝenas min. Sed tamen tiu ĉi Haltin estas heroo, kiu ĉesigis la tumulton, kiam via patro furiozigis en la Kastelo. Do decas danki al li. »

Alina : « Kara Haltin ! Mi aŭdas ke mia patro ŝuldas al vi dankon. Dank' al via klopodo oni povis eligi jam la ĝermon de malbono kaj Umori apenaŭ profitis forkuri senriske. Mi pensas, ke Umori jam vizitis vin por danki. »

Princo : « Apenaŭ ni alvenis hejmen post la ekskurso en la montaro, li elvenis la Kastelon sagkure ĉe la pordego kun paliginta vizaĝo kaj subite koliziis kun Alina, falis teren kaj vundiĝis ĉe la kruro. Mi vere sentis kompaton vidante lin forkuregi. De tiam mi deziris sendi iun por demandi pri lia vundigo, sed mi estis tiel melankolia, ke mi vole-nevole tion prokrastis. Haltin ! Kiam vi hazarde vidas lin, bonvolu doni al li miajn sincerajn salutojn. »

Haltin : « Volonte ! Umori tre ĝojos, se li sciigos pri via afableco. Nu, Ŝ-ro Alina, ĉu certe estas vere, ke via patro montris obeemon al Lia Princa Moŝto kaj ne sin trudos de nun al li. Ĉu vere ? »

Alina : « Absolute vere ! Li indikis tion al mi per sia profunde serioza mieno. Ja vi imagu, kiom mi pike ekspluatadis mian langon ĝis kiam mi fine sukcesis lin persvadi. Dum tridek tagoj kaj en la lastaj tagoj kun jam eluzita lango. Dank' al tio mia granito finfine rezignis rezistemon kaj en lian kapon venis iom da nova sento. Mi nun sentas la feliĉon de nia lando. »

Haltin : « Ho, ĉu vere ! Mi vidas. Li Samori estas prudenta homo. Mi do ankaŭ obeos al la Princo, sekvante la konvertiĝon de Samori. Mia Ekscelenca Moŝto ! Pardonu min pro mia ĝisnuna obstineco, mi petas. »

Haltin, sklavo de memano, gloro kaj potenculoj, ruze kaj lerte flatas per aromaj vortoj.

Princo : « Ha, ha, ha, . . . Vi nomis min ĝisnun kvaŝaŝolene, Mia Princa Moŝto, Via Ekscelenca Moŝto, sed laŭ viaj nunaj vortoj mi povas legi, ke vi nur pretekstis

respekton kaj mistifikis min? Ja bone. Ne estas vi sola, sed ĉiuj aliaj vasaloj estas tiaj. Jen mi ne ŝatis ilin. Nu, S-ro Haltin, venu alian fojon denove, ĉar mi havas aferon interkonsiligi kun Alina.»

Haltin: « Volonte. Mi tre dankas vin. Ĝis revido, Mia Ekscelenca Moŝto! »

Haltin foriras salutante ripetfoje kaj flate.

Princo: « Aha, ha, ha... Malaperis la hipokritulo. Nun ni estas inter ni. Ĉu vi ne havas interesan novaĵon? »

Alina: « Nenio nova. Kaj por diri la veron mia patro s-ro Granito, neniel konvinkigis. Ĉar nun apudestis Haltin, la adoranto de Granito, mi intence diris falsaĵon kvazaŭ alude. »

Princo: « Ho! Kara ĵonglisto vi estas. Ironia estas la subita metamorfozo en la sinteno de Haltin. Mi lernis la subtilecon de la homa naturo. Nu, rigardu tiun ĉi portreton, kara Alina. De tempo al tempo ĝi kvazaŭ hipnozadas kaj flustras dolĉe al mi. Min konsolis tiu ĉi portreto dum via foresto. Kiel belega ŝi estas! »

Alina: « Mia Princo. Ĉu f-ino Svarle tiel plaĉis al vi? »

Princo: « Jes. El la fundo de mia koro. Tage kaj nokte brilas la figuro de Svarle ĉirkaŭ miaj okuloj kaj min dronigas en abismon de amo. Tamen portreto estas portreto. Nenia viva kaj dolĉa voĉo aŭdigas el ĝi. Mi ja ardas ŝin vidi ankoraŭ fojon. Sed vane, ĉar akra gardo min ĉirkaŭvolvis. Ho, ve! Kara Alina. »

Alina: « Se vi tiel amas Svarle, ĉu mi iru al ŝia patro denove kaj laŭ lia permeso, mi akompanu la fraŭlinon tien ĉi en la Kastelo? »

Princo: « Se eble, mi petas. Sed kiel oni povus ŝin akcepti en la Kastelo? »

Alina: « Ve!... Estas ja bona ideo. S-ro Taltin, Majstro de te-ceremonio, konata al vi! Ni petu al li, ke li kaŝe zorgu pri Svarle en ŝia laŭbo. Certe por tio ni devas bridigi lian buŝon per mono. Tiamaniere vi povos ŝtele vizitadi la fraŭlinon por ŝin amuzigi. Kiel vi opinias? »

Princo: « Do vi bone arangu, mi petas. Mi jam ne povas min deteni. »

Alina: « Volonte, mia kara Princo! Do atendu! »

Eljapanigis **T. Nakamura**

Ideoj tra Esperantujo...

Ni ricevis tre interesan leteron de s-ro Thomson, prezidanto de la Esperanto Societo en Sydney, Aŭstralio — el kiu ni ĉerpas la sekvajn liniojn:

... « Mi ŝatas vian kritikon pri Kalocsay. Ne ĉie li pravus, ĉar neniu homo estas perfekta. Precipe mi trovas enuiga la unuan parton de Lingvo-stilo-formo. Teda estas la artefarita divido de radikoj. La verbo estas gramatikista invento (sic!). Pli ĝusta divido de la radikoj estas « konkreta » kaj « abstrakta ». Abstrakta radiko ĉiam naskigas senpere netransitivan verbon kaj konkreta naskigas senpere transitivan verbon. Tamen, konkreta radiko — uzata metafore — naskas netransitivan verbon. Ekzemple, « brili » venas la latina « beryl » (?) kiu signifas « brila gemo » — kaj penetris en Esperanton pere de la franca « briller ». Kiam ni diras, ke la suno brilas, ni diras, ke la suno donas lumon aŭ lumas kiel « beryl ». Brili estas do metafora uzo de « beryl », sekve ni konstatas, ke la verba formo de « bril » estas netransitiva... »

Krome s-ro Thomson kritikas la « pedantecon » kaj « diplomatecon » de Kalocsay rilate al lia pravigo de la forlaso de « a » en poemoj. Li ankaŭ asertas, ke la sola vera verbo en Esperanto estas « esti ». La aŭtoro de tiu ĉi artikoleto efektive konvinkigis, konsultante modernan francan stilistikon, ke ĉe l' grupigo de l' vortoj laŭ la senco, « esti » okupas apartan kategorion, kiel « absoluta verbo ».

Poste s-ro Thomson konkludas: ... « Ĉina filozofio ĉiam konstatas « abstrakta » kaj « konkreta », « Yan » kaj « Yin », « vira » kaj « virina ». ... Mi esperas, ke iu orienta pensulo kontraŭstaros al la influo de Kalocsay, rilate al lia elizio de l' « a » kaj ankaŭ kontraŭ lia klasigo de l' radikoj.

OOMOTO neniel intencas aprobi aŭ malaprobi la kritikojn de nia aŭstralia samideano sed vokas al sinjoro Kalocsay, ke li bonvolu honori nin per respondo al sinjoro Thomson sur nia gazeto. Same ni tiras la atenton de la « orientaj pensuloj » al la vortoj venintaj de la antipodoj kaj ni forte esperas, ke ili baldaŭ konsentos doni la atendantan respondon sur OOMOTO. Finante ni devas rimarkigi, ke la vastega kaj tutmonda intersango de ideoj per nia lingvo estas ĝojiga fakto pruvanta la vivantecon kaj la ĉiam kreskantan nivelon de nia literaturo. J. M.

Misio de la virinoj

umiko Deguĉi

La 30an de Oktobro, en la dua tago de la aŭtuna Festo de Oomoto, oni okazigis inaŭguracion de la Ligo de Oomotaninoj. Kiel estro de la Ligo, Dua Majstrino de Oomoto faris paroladon antaŭ kelkmil ĉeestantoj. Tiu ĉi estas elĉerpaĵo el ŝia parolado.

(Red.)

Kiam Oomoto estis en malfacila stato je ekonomia flanko en unuaj tagoj, samtempe mia hejmo ankaŭ estis tre mizera. La familianoj estis multaj malgraŭ granda malriĉeco: la patrino (Fondintino), onklino (pliaga fratino de la Fondintino), ni geedzoj, du infanoj kaj plie aliĝis al ni la patrino de la Majstro, ĉar ŝia domo en Anao, proksime de Kameoka, forbrulis malfeliĉe. Finfine ni trovis nenian vivrimedon, ol atendi malsatmorton. Do la Majstro decidis fariĝi diservisto de iu ŝintoisma templo, forlasinte propagandon de sia Oomoto, kaj ekiris kun kelkaj malgrandaj moneroj en sia poŝo.

Mi volis esti dungita en iu rizvendejo kaj tamen kiel multfoje mi iradis vane al la vendejo por peti! Ankaŭ, mi plantis legomojn sur malvasta loko malantaŭ la domo kaj vendis ilin por la rizo, portante sur la ŝultroj. Tie ĉi mi ne povas paroli tre detale, sed mi pacienceme batalis kaj batalis kun ĉiuj malfacilaĵoj, kiuj tute ne mankis al mia tiama familio. Foje mi diris al la patrino kun plendo, ke mi jam ne povas toleri je tia granda malfacilaĵo. La Fondintino respondis severe: Kiel vi povus partopreni al ĉi-foja granda Dientrepreno, plendante je tia malgranda asketado? Kiam manĝaĵoj al ni mankis, ni do prenu teraĵon kaj trinku akvon. Dio certe ne lasos nin morti.

En tiu tempo ni faris nenian negocon; ni havis malpli ol tridek jenojn da enspezo en unu jaro kaj nia tuta havaĵo estis malgrandaj domo kaj teritorio. Kaj tamen la familianoj estis multaj, inter kiuj estis du infanoj; elspezo estis sufiĉe multa. En tia stato mia ĉagreno estis

granda je la mastrumado, des pli por ke najbaroj ne rimarku nian almozulecan vivadon, kiu estis malhonoro de nia familio. Malgraŭ tia mizereco, dank' al Dia gardo, ĝis hodiaŭ ne estis eĉ unu tago, kiam ni rezignis manĝon, kaj ankaŭ oni ne insultis, ke Oomoto estas malriĉa.

Kiam la nuna Majstro, mia edzo, ekiris piede al Kioto por eniri en ŝintoisma lernejo, mi akompanis lin ĝis duonvojo kun du infanoj. Ĉe la disigo la Majstro aĉetis kukojn por du el kvin senoj, kiuj estis la tuta sumo en lia poŝo, kaj donis al la infanoj. Diversaj pensoj nin emociis ĝis larmoj kiam ni salutis « ĝis la revido ». Ankoraŭ hodiaŭ mi freŝe rememoras tiaman scenon. Se la edzo prizorgos pri la hejma afero, li ne povos sin profundigi en la studado, mi pensis; kaj tial kiam mi skribis al li, ĉiam mi diris: ne estu maltrankvila, mastrumado bone iras. Tamen, en efektiveco malriĉeco estis ĉiam ankoraŭ pli. Ekzemple en malvarmego mi ne havis vintrajn vestaĵojn, do aliformigis someran kimonon por vintra kaj renverse. Tiele mi batalis malfacilaĵojn kaj trabatis al mi vojon. La Majstro kun sukceso finis la lernejon, dank' al tio, ke li povis tute sin doni al la studado, forlasante hejmajn aferojn. Tie ĉi kuŝas la vera laboro de la virinoj, mi pensas.

La rolo de la membroj de Oomoto-Junulara Ligo tre graviĝis nuntempe: nunaj Japanujo kaj la mondo atendas ilian sindoneman laboradon. Kaj por ke ili laboru tute libere, vi, membroj de Oomotanina Ligo devas esti pli streĉitaj tiel ke vi puŝos ilin de malantaŭe.

(Eljapanigis: K. Vivlong).

SINJORO LAŬDATA

Paĝo: 200 - ŝtofbindita.
Prezo: 10 resp. kuponoj.

— Verkaro de poemoj, frazoj kaj prozoj de tutmondaj homaranoj —

Tuj meudu ĉe: OOMOTO, Kameoka (Kioto-hu) Japanujo.

8. Pri la sistemaj sensoj.

Ni daŭrigu la studon pri niaj sensoj. Konsultante la tabelon aperintan en la septembra numero, oni vidos, ke ni alvenis al la dua granda grupo de sensoj, kiun ni nomis « sistema ». Tie ĉi ni distingas du subgrupojn, kiujn ni aparte konsideros: A. Organisma senso (malsato, lacigo, seksaj- kaj ceteraj impulsoj) kaj B. Doloro. Antaŭ ol konsideri la detalojn, ni devas atentigi la leganton, ke la studo pri « internaj » sensoj estas same grava kiel tiu pri la eksteraj — sola objekto de la psikologiaj studoj en la tielnomata « klasika » periodo de tiu ĉi scienco. Se oni dubus pri tio, simpla dentdoloro konvinkos la leganton pri la graveco de « internaj » sensoj.

A. Organisma senso. Estas tre malfacile studi pri la komplikaj procezoj de organismaj sentoj ĉar la sensoj estas profunde en la korpo, ankoraŭ tre malperfekte konataj. Oni devas distingi kvar ĉefajn organismajn sensojn: 1) digesto, 2) spirado, 3) seksa kaj 4) ĝenerala farto. 1. Digesto: tie ĉi apartenas sento pri sato kaj malsato, soifo, ktp. Oni povas senti malsaton eĉ kiam la stomako estas tute plena; tia fenomeno estas tre ofta en moderna civilizo kaj montras certan degeneradon de la korpo. Estas bone konate, ke emocioj influas digestajn funkciojn — nome timo aktivigas eliminadon de ekskremento, k.a. Tie ĉi oni ree povas konstati la multspecajn interrilatojn en la korpo, ne ankoraŭ plene esploritaj eĉ de fakuloj. 2. Spirado: Kvankam tiu ĉi senso estas simpla, ĝi estas eĉ malpli komprenebla ol la sensoj en la antaŭa kategorio. Oni sentas batadon de la koro, « sufokon », timo kaj ekscito rapidigas spiradon, ktp. 3. Seksaj impulsoj: krom la lokaj sensoj pri seksa deziro kaj seksa satigo ekzistas tre komplikitaj procezoj, kiuj kondukas al la mil problemoj de « subkonscio »: pro manko de sensoroj la konscio ne informigas pri tiuj procezoj sed ili tamen estas tiel gravaj, ke ili ofte subpremas

ĉiujn aliajn konsiderojn kaj superregas la individuon.

4. Ĝenerala farto: oni aparte sentas bonan kaj malbonan fartojn. Eble ne ekzistas speciala sensorgano por tiu ĉi senso, ĝi estas verŝajne la rezulto de ĉiuj sensoj en la korpo. Eksteraj stimuloj ofte reagas sur tiu ĉi senso — aŭdo de bela muziko kaŭzas bonan kaj tiu de malbela muziko kaŭzas malbonan farton (almenaŭ parte). «Kiel vi fartas?» — «Bone, sufiĉe bone, malbone, mizere, ktp.»: tiu ĉi banala dialogo montras, kigrade la senso de la «ĝenerala farto» estas grava. Niaj agoj ofte dependas pli de nia farto ol de eksteraj kondiĉoj. Tiu ĉi konstato multe malgrandigas la krediton de la materialisma skolo, laŭ kiu homo agas laŭ determinitaj stimuloj de la ĉirkaŭaĵo. Ne, en donitaj cirkonstancoj homo povas agi diversmaniere kaj la libereco de la volo ofte eĉ perfortas la ordonon de ambaŭ ĉirkaŭaĵo kaj «ĝenerala farto»: tia estas la kazo de soldato, kiu intence mortas sur bataalkampo, kiam li facile povus fuĝi.

B. Doloro: Tiu ĉi senso estas aparta de la laste nomita «farto». Ekzistas specialaj nervoj por la transporto de dolor-sensaĵoj sed malsame de aliaj nervoj, ili ne finiĝas en sensiloj; ili estas nomataj liberaj nervofinoj. Varmo estas bona por la korpo, sed se ĝi venas en troa kvanto kaj la ordinaraj riceviloj ne plu kapablas ĝin ensorbi, parto de la superflua varmoenergio eniras tiujn ĉi liberajn nervofinojn kaj la sento «doloro» estas averto al la konscio pri danĝero de troa varmo. Oni distingas multajn variojn de doloro, kiujn oni pli malpli konas el propra sperto. Ĉiuj dolor-sentoj estas kompreneble malagrablaj — sed oni devas bone kompreni, ke tio nur rezultas el la samtempa funkciado de du diversaj sensoj: doloro kaj ĝenerala farto. Dolor-senso estas tre utila, ĉar ĝi atentigas nin pri danĝero kaj pri forigindaj stimuloj.

9. Pri la motoraj sensoj.

Konsultante la tabelon publikigitan en nia septembra numero, oni vidos, ke ni alvenis al la tria, lasta grupo

de sensoj. Tie ĉi ni ankaŭ distingas du sub-grupojn :

A. Kinetika (mova) senso : Tiu ĉi senso servas por la konscia enregistro de muskolaj movoj en la korpo. Kiel oni bone scias, ne ĉiu muskola movo estas konscia — plejparto de la internaj movoj de la diversaj organoj okazas tute sen-konscie. Komprenoble, ni nur konsideras tie ĉi la konsciajn movojn de la korpo. La kinetika senso montras ne nur, ke movo okazis sed indikas ankaŭ la direkton de la movo. Kiam oni turnas sian kapon dekstren, oni bone « sentas » kaj la movon kaj ties direkton. Post longa ekzerco de muskoloj, ni konscias pri « laciĝo » : kiu estas unu plia aspekto de la kinetika senso. Sed korpa laciĝo ofte estas iluzia kaj vere temas pri mensa laciĝo. Ni kapablas rapidege skribi punktojn kaj komojn sed se ni skribus la saman kvanton de vortoj en la sama tempo, ni sentus grandan laciĝon en la muskoloj de la mano : estas tamen evidente, ke la centro de la laciĝo estas la menso kaj la kinetika senso trompis nian konscion en tiu ĉi kazo.

B. Statika senso : Kvankam tiu ĉi senso similas la kinetikan senson ĵus pritraktitan kaj ofte kunlaboras kun ĝi — oni devas bone distingi la ambaŭ. La organo de la statika senso estas en la interna orelo kaj konsistas el 3 kanaloj kaj kelkaj sakoj. La tri kanaloj estas je rekta angulo unu al la aliaj kaj en malsamaj ebenoj (tri dimensioj). Ilia ekstera formo similas hufoferon kaj ili estas ostecaj laŭ strukturo. Tiuj ĉi kanaloj enhavas likvaĵon nomatan « endolimfo ». Oni nun komprenos la mekanismon de tiu ĉi senso — malmulte konata ĝenerale : je ĉiu movo de la kapo la likvaĵo en la kanaloj moviĝas kaj la ricevita sento estas pri movo kaj rotacio — dum la sakoj servas por la konscia enregistrigo de la pozicio de l' kapo (supre aŭ malsupre).

Ni ne povas konsideri tie ĉi la biologiajn detalojn de l' orelo : sufiĉas menciigi, ke la statika senso estas pli malnova ol la aŭdsenso, kvankam ĉe komplikitaj organismoj la aŭdsenso fariĝis pli evoluinta. Kunlaborante kun la kinetika senso (muskolmovoj), la statika senso (orela likvaĵo) indikas la ekzaktan pozicion de ĉiuj partoj de la korpo.

10. Konkludo pri la sensoj.

Komence de la julia numero, dum la lastaj ses monatoj ni studis pri la diversaj sensoj de la homo kaj fine ni venis al la konkludo pri tiu ĉi ne tre amuza sed nepre necesa enkonduko al ĉiu psikologia sistemo. Ni devas ree akcenti la fakton, ke homo posedas ne kvin sed almenaŭ dek unu sensojn, kiujn ni pritraktis iom detale ĝis nun. El la kvin tradiciaj sensoj flaro kaj gustumo estas multe malpli gravaj ol dolor- kaj mov-sensoj. Oni ne devas forgesi, ke ni dividis la 11 sensojn je 3 grupoj: ekstera, sistema kaj motora. Oni konstante konsultu nian tabelon en la septembra numero, ĝis oni parkere memoros ĝin. Tio estas nepre necesa, se oni volas akiri ioman konon pri psikologio.

La eksteraj sensoj permesas percepton, memoron kaj pensadon. Tiuj ĉi sep sensoj permesas la funkciadon de la homa intelekto: empiria kono baziĝas sur ili. La sistemaj sensoj permesas la konscian enregistron de korpaj impulsoj kaj sentoj. Fine, la motoraj sensoj sciigas al ni la diversajn movojn de la korpo; ili permesas niajn aktivajn spertojn kaj la funkciadon de la volo.

Oni neniam devas forgesi, ke niaj « spertoj » estas kombinaĵoj el multaj detalaj « sensaĵoj ». Unu sensaĵo (sento) ne estas sperto en si mem, nur elemento aŭ atomo de sperto. Konscia mensa vivo de la homo konsistas el diversaj tiaj spertoj. Komence de Januaro ni komencos la studon de pli interesa ĉapitro de psikologio, tiun pri la Konscia Vivo.



Imita Konferenco de la Ligo de Nacioj. Legu la 28-paĝon.

La Aŭtuna Festo

La Aŭtuna Festego de Oomoto okazis en Ajabe kaj Kameoka dum kvin tagoj de la 30a de Oktobro ĝis la 3a, Novembro. Dum la tempo vetero favoris kaj teritorioj estis plenaj de gevizitantoj el ĉiuloke. Arboj en la teritorioj kaj ĉirkaŭaj montoj jam bele ruĝiĝis kvazaŭ ili bonvenigas la vizitantojn.

Unua tago (Ajabe)

○ De la oka kaj duono okazis en la granda preĝejo, Mirok-deu, ricev-ceremonio de la fili-standardo de Oomoto Junulara Ligo. Kvindek naŭ standardoj estis nove faritaj. La reprezentantoj de filioj respektive ricevis ĝin de S-ro Hidemaru.

La Ligo jam havas tricent filiojn.

○ De la deka la Festego komenciĝis tre solene, kiel kutime, sub la ĉeesto de tutaj ĉefaj figuroj de Oomoto kaj la granda preĝejo da partoprenantoj.

Post harmoni plena kunmanĝo, okazis la 8a Ĝenerala Kunsido, al kiu la Majstro ankaŭ ĉeestis kaj faris paroladon. Interalie Li parolis :

Nun la mondo troviĝas antaŭ abrupta montopinto ; samtempe ni Oomotanoj ankaŭ staras en sama cirkonstanco. Ĝisnun Oomoto renkontis diversajn malfacilaĵojn sed ankoraŭ ni povis marŝi sur ebena vojo. Tamen denun ni ja devas trapasi tre abruptan kaj dornoplenan vojon. Inter ni kelkiuj, mi timas, flankeniĝos pro troa suferado. Mi esperas, ke tiuj energie daŭrigos marŝadon ĝis la triumfa metropolo per siaj tutaj fortoj, oferante varman preĝon al Dio, ĉar nia venko estas promesata...

En la reala mondo la homoj estas nesincerecaj kaj hipokritaj kaj tial por regi ilin estas nenia rimedo ol katenigi per klasoj. Kunligiĝo de Oomotanoj estas ja tiu de sincereco kaj sincereco. La vera ordo de korporacio aŭ socio efektiviĝos, kiam individuo staras en la korstato, ke mi estas nacio, ĉielo, tero kaj ja universo. Oomoto staras en ordo senorda kaj ĝi estas nereligia religio, nepolitika politiko kaj nearta arto. Tio ĉi estas diferenco de la regado inter Dia kaj reala mondoj....

Sekvante al Li salutis ankaŭ S-ro Hidemaru, post kiu S-ro Uĉimaru faris diversajn raportojn kaj proponojn.

Dua tago (Ajabe)

○ De la 13a okazis festo de la Fondintino en Kjoso-den, kie ŝia sankta spirito estas apoteozita. Poste oni vizitis ŝian tombejon. Estas okulfrapa afero, ke kelkcent membroj de Junulara Ligo, ĉiuj en la uniformo, marŝis al la tombejo de la Fondintino per akompanado de trumpetoj.

○ Vespere oni prezentis teatraĵojn, kiuj estas dramigitaj el la «Rakonto el la Spirita Mondo» verkita de la Majstro. Ĉiuj miris je la lerta prezentado. La aktoroj astas kompreneble amatoraj, kiuj laboras en ambaŭ teritorioj Ajabe kaj Kameoka.

Tria tago (Ajabe—Kameoka)

○ De la oka matene oni havis la Ĝeneralan Kunsidon de Oomoto Junulara Ligo. Al ĝi ankaŭ ĉeestis la Majstro, s-roj Hidemaru kaj Uĉimaru kaj respektive faris instigan paroladon al la ĉeestantoj. Mal-longigo de la parolado de S-ro Hidemaru:

Tiu ĉi ligo estas korporacio kunligita sur la religikredo; je tiu punkto ĝi estas tute alia ol ordinaraj societoj. Nuna idea kampo estas dividita en du partojn maldekstran kaj dekstran. Nia ideo tute ne povas akcepti la unuan, sur la radikala vidpunkto; la kialo estas tute evidenta, ĉar la nia estas religia kaj la alia estas materialisma, do inter ili troviĝas granda diferenco. Ankaŭ, ol la lasta nia estas alia. La dekstra ideo ne havas religikredon kaj la spiriton de bonamo. Restarigi la mondon perforte per premanta potenco, estas eraro, ĉar tio ne baziĝas sur vera amo. Kompreneble, kelkfoje bezoniĝas potenco kaj premado, sed en tia okazo ili devas veni el Dia forto; se ne, ili estas falsaj. Ankaŭ ĉe tio niaj ideoj kaj movado estas multe superaj al la alia...

○ Lastatempe estas fondita la Ligo de Oomotaninoj. Posttagmeze de la tria tago de la Festo ĝia inaŭguracio estis okazigata sub la ĉesto de multaj membroj el ĉiuloke de la tuta lando. La Majstrino kaj Sinjorino Hidemaru faris paroladon. (Referencu la artikolon kun la titolo «Misio de la virinoj») Kvankam ĝisuun la laborado de Oomotanaj virinoj en la tuta lando estis notinda, sed nun kun bona sistemo ĝi pli vigliĝos.

○ La tagordo de la Festo transiris posttagmeze de Ajabe al Kameoka. Vespere en Taiŝo-den okazis la 4a oratora kunsido de Junulara Ligo, al kiu partoprenis pli ol tridek ĉampionoj senditaj de filioj.

Inter ili troviĝis eĉ maljunulo kaj bela fraŭlino. Ĉiuj oratoroj kortuŝis la tutan ĉeestantaron per sia fervora parolado: ili parolis kun forta varmeco aŭ pri sintenado de Oomotanoj por la eksterordinara nuna stato de Japanujo kaj la mondo, aŭ pri denuna marŝado de la socio-kaj la sorto de la homaro.

La unuan premion gajnis s-ro T. Okano, el Himezi-Filio.

Kvara tago (Kameoka)

○ Antaŭtagmeze oni havis solenan feston en Taiŝo-den, al kiu ĉeestis ne nur ĉiuj vizitantoj, sed la poliestro kaj la urbestro de Kameoka. Post la festo okazis posttagmeze kelkaj diversaj kunsidoj.

○ De la 18a estis la vespero de Esperanto. Sur la bele ornamita scenejo junaj geesperantistoj parolis flue, knabinetoj ĉarme kantis sole aŭ kune esperantajn kantojn, antaŭ multaj ĉeestantoj plenplenaj en la kunveno. Post la malferma saluto s-ro Hidemaru ankaŭ faris mallongan paroladon. Nuntempe li studas diligente la lingvon, aplikante etan tempou el sia aferoplena ĉiutaga vivado.

Plej poste oni prezentis imitan Konferencon de la Ligo de Nacioj. La enhavo de la Konferenco estas:

Tuj post la malfermo la japana reprezentanto proponis uzadon de la internacia lingvo Esperanto en la Konferenco, ĉar ĝisnun Japanujo ofte havis maldolĉajn spertojn en gravaj Konferencoj pro malfacilaj lingvoj angla kaj franca kaj nun al ĉi tiu Konferenco Japanujo ja vetas sian tutan sorton. Malgraŭ kontraŭstaro de kelkaj reprezentantoj la Ligo akceptis Esperanton per decido laŭ plimulto. Dank' al la lingvo, japana reprezentanto, ne kiel kutime, tute libere parolis kaj klarigis sian cirkonstancan, kaj aliaj ĉeestantoj siaflanke bone komprenis Japanujon per tre bela parolado esperanta de japana reprezentanto, kiu ĝisnun fuŝe parolis angle. La miskompreno kuŝanta inter ili tute foriris kaj Manĉuria Afero, kiu estis eksterordinare komplika demando, solviĝis tre facile. La mondopaco estas garantiata denove.

Anoncisto de Ĝeneva Radio-Kompanio disaŭdigis japane al la publiko la staton de la Konferenco.

. La vespero de Esperanto estis tre sukcesa.

Kvina tago (Kameoka)

○ La tutaj ĉeestantoj al la Festo vizitis hodiaŭ al la uasklokon en Anao de la Majstro. La patrino de la Majstro, kiu estas jam 84 jara, tamen ankoraŭ tre bonfarta, kaj kiu modeste vivas sian maljunan vivon en la malgranda dometo, akceptis la vizitantojn tre afable per teo kaj kuko. La okuloj de la vizitantoj malsekiĝis per larmoj, vidante la tro modestan dometon de la patrino, kies filo nun estas adorata kiel Diheroo ne nur en Japanujo sed en eksterlandoj. La kortuŝitaj gastigoj adiaŭis kun profunda piemo al ŝi.

○ «Vespero de Rido» okazis en Taiŝo-den de la sepa. Multaj amatoroj sinsekve supreniris sur la estradon kaj prezentis komikaĵojn, kantojn, ĵonglaĵojn ktp. Ridego ofte regis la tutan kunvenejon.

La Aŭtuna Festo dum kvin tago finiĝis per serena ridego.

Sur Rivero Donnan

K. Kakehi, Saigon

Mia ŝipo haltis proksime de la enirejo de Rivero Donnan kaj atendis pilotojn. Tie ĉi ĉiuj ŝipoj estas tute devige akompanataj de piloto, laŭ ordono de la franca registaro. En Japanujo ankaŭ oni devas dungi piloton kompreneble en danĝera loko, sed la regulo ne estas tiel severa kiel ĉi tie. Dum du tri horoj da gvidado ĉi tieaj pilotoj perlaboras kvincent aŭ sescent Jenojn.

Tre malpura estas la akvo de Rivero Donnan. Iu ŝipano, kiu migris preskaŭ ĉiujn havenojn de la mondo, rakontis al mi, ke malpureco de la akvo estas karakterizaĵo de riveroj en ĉiuj kontinentoj, dum tiu de Japanaj riveroj estas pura. Ĉar en Japanujo estas multaj montoj, sur kiuj abundas arboj, kiuj malhelpas enfluan de teraĵo en riveron okaze de pluvo, kaj plue rivero estas mallonga. Pro tio japanaj riveroj estas puraj. Sed tiuj de kontinentoj trafluas vastan eberaĵon kaj longan distancon, portante en si kotajon survoje; tial la fluo fariĝas malpura.

Ankoraŭfoje mi mirigis la fakto, ke fiŝoj en japanaj maroj estas la plej bongustaj ol tiuj en iu ajn alia maro de la mondo. Ankaŭ, en ĉi tiu rivero vivas la krizofriso, tino k.a., kiuj apartenas al la sama kategorio kun tiuj en Japanujo. Sed ili estas tre malbongustaj. Malproksimen forlasante la patrolandon, mi trovis por la unua fojo ĝiajn bonecon kaj purecon.

Laŭ la veturado sur la rivero, tie kaj ĉi tie sur la bordoj oni trovas dometojn de indiĝenoj, kiuj estas malpli belaj ol stalo en Japanujo. Mizereco de la vivado de la indiĝenoj estas facile imagebla. Kunvojaĝanto al mi rakontis pri ilia vivstato, aŭ pri la politiko de la registaro. Absurdo ne mankas ĉie sur la tero!

Post kelkaj horoj da veturado ni atingis al la haveno Saigon, kie troviĝis francaj militŝipoj kaj ĉinaj vaporŝipoj. Vespere mi prenis aŭtomobilon por rigardi la urbon. Stratoj estas vastaj, belaj kaj ornamitaj per franca maniero. Estas prave, ke oni nomas la urbon malgranda Parizo. Ĉe tabloj sur la strato antaŭ granda restoracio kelkcent francoj trinkas kaj manĝas, kantas kaj dancas tute senĝene, farante grupojn kelkloke, en malvarmeta vento de somera vespero. Tio estas beleta, agrabla kaj okulfrapa afero por mi, kiu vidis tian scenon por la unua fojo.

Sed tamen, se oni iom detale esploras la urbon kaj la landon, tuj oni rimarkos dikaŭ linion, kiu maljuste limigas la regatojn kaj la regantojn, nome, la indiĝenojn kaj la aliajn. Mi estis malgaja, pensante, ke ĉie vivas multaj kompatindaj gentoj, kiuj ĉiam estas perforte premataj. Al mia cerbo revenis frazo el la Sankta Skribo de la Fondintino: Se supra kaj malsupra klasoj ne akordiĝas en plena harmonio, la mordopaco neniam efektiviĝos... La misio de ni, batalantoj de Homama movado estas ja granda.

Post unutaga restado en Saigon mia ŝipo ekveturis al Siam, malsuprenira te la riveron Donnan. En la krepuskō, kompatinda Anam perdiĝis el mia vido.

(Okt. 1932)

Ŭake-no-Kijomaro

Japanana lojala vasalo

H. Jamakaĉa

Japanoj komune havas ian propran spiriton, ian kredon ie en la fundo de sia koro. Ĝi estas, mi povas diri, pieco, lojaleco kaj patriotismo. Jam de antikveco ili havis ian piecon al Dio, la Kreinto, eĉ se ĝi ne estus bazita sur formala kredo religia. Ilia lojaleco al Mikado estas absoluta, ĉar ili kredas, ke Mikado estas ido de Dio kaj sekve la familio, devenanta de la Kreinto, daŭras kaj por eterne daŭros, generacion post generacio, kiel rekta linio. Japanoj nomas sian landon « la lando de leviganta suno » aŭ « regno de Dio » kaj firme kredas sin « popolo de Dia regno » laŭ la atesto de la historio mem. Ke la sankta trono daŭradas por ĉiam kun nenia interrompo, tio estas la plej granda fiero de japanoj. Mi supre skribis « patriotismo ». Tamen tie ĉi ĝia senco estas iom alia ol ordinara, ĉar eĉ ili ĝi ne estas simpla « amo al patrujo kaj inklino servi al ĝi », sed ja patriotismo ĉiam bazita sur respekto al Dio kaj lojaleco al la Mikado. Tiuj sentoj kunfandiĝis kaj formas la propran spiriton de japanoj.

Post tiu priskribo mi nun prezentas la japanan lojalan vasalon Ŭake-no-Kijomaro. Pere de mia rakonto, se niaj legantoj konceptos ion pri japana spirito, tiam mi estos rekompencita.

Ŭake-no-Kijomaro, vere grandiozulo li estis! Kial li estis tiom grandioza? Kiam ni legas la longan historion de l' homaro, ni trovas sennombrajn heroaĵojn. Estis multaj grandaj generaloj, kiuj komandante nur malgrandan armeon venkis kelkoble, kelkdekoble grandan nombron da malamikoj; ne estis malmultaj geniaj oratoroj, kies arda kaj elokventa parolado neniam malsukcesis imponi kaj konvinki la rivalon; estis multaj geniaj saguloj, kiuj per sia dia talento sukcesis fari grandiozajn entreprenojn; estis sufiĉe da kuraĝaj bravuloj kiuj kuraĝe riskante sian vivon kaj eltenante eksterordinarajn malfacilaĵojn, finfine plenumis grandajn heroaĵojn. Tra la historio ĉu orienta ĉu okcidenta, malnova aŭ moderna,

tiuspecaj herooj ĉiam subite sin levis kiel nubo kaj radias ankoraŭ nun sian pompan brilon kiel ĉielarko.

Tamen nia lojalulo Kijomaro ne estas brava generalo, nek elokventa oratoro, nek talenta diplomato. Pro tio, dum tiuj herooj pompe sin montras kiel arta fajraĵo, li sole brilas kiel unu klara stelo en la ĉielo. Tamen tiu brilo estas poreterna kaj propra kompareble al nenio.

Kijomaro, kiu per sia tuta koro ĉiam marŝadis nur en justeco, — cedante al nenia potenco, timante nenan atencon, forpelante ĉiun allogon, timante nenan persekuton — li ja estas havanto de ia grandioza kredo, de io absoluta, kiun ŝanceli neniu povas per kia ajn forto. Jes, li estas respektinda viro, modelo popola japana.

La Imperiestrino Ŝootoku surtronigis en 1424 (laŭ japana kronologio). En tiu tempo Budaismo jam tre prosperis kaj havis grandan influon en Japanujo enkondukte el Ĉinujo nur antaŭ 200 jaroj. Kaj okaze de la surtronigo, unu potenca bonzo nomata Dookjoo estis nomata al la tre alta ofico de ĉefministro, kio estas tute eksterordinara okazaĵo kaj kompreneble grandega honoro por li. Kaj ankoraŭ du jarojn poste li eĉ ricevis ja senantaŭekzemple honoran rangon de « Hoo-Oo ». (Ĝi estas titolo por imperiestro, kiu farigis bonzo post sia abdiko. Tia abdiko okazis kelkfoje nur en la mezepoko.) Malgraŭ tio, ke li estis favorata de vere superpopola rango, Dookjoo neniam kontentigis; lia senmezura ambicio ĉiam pli-altigis. Li faris ĉiuspecajn perfortaĵojn kaj finfine, kia impertinentaĵo! li intencis proprigi al si eĉ la sanktan tronon. En la sekva jaro, Dookjoo komplotis kun sia subulo Suge Asomaro, ŝinto-pastro de la influa sanktejo Usa-Haĉiman. Kaj laŭ lia sugesto Asomaro ja kuraĝis fari trompan raporton al la Imperiestrino en la nomo de la orakolo de Usa-Haĉiman:

« Se la Imperiestrino abdikos la regecon al Dookjoo, tiam perfekta paco regos la tutan landon. »

Kia blasfemo tio estis! Antaŭ ol kulpigi la males-timindan fibonzon, ni devas milfoje riproĉi Asomaron, kiel ajn li blindigis pro profitamo. Kvankam la Imperiestrino Ŝootoku estis embarasata pro la falsa orakolo kaj Ŝi havis profundan konfidon al Dookjoo, Ŝi tamen

ne akceptis la tuĝon de la orakolo. Kredeble la Imperiestrino pensis tion malagrable, ĉar Ŝi ne kredis la orakolon, kaj sekve, transiginte sian penson al la korteganino Hiromuŝi (pli aĝa fratino de Kijomaro) sendis sian fraton Ŭake-no-Kijomaro al Usa-Haĉiman por aŭskulti ĝustan orakolon. (En Japanujo Dia instruo kaj regado havas profundan interrilaton; jam de antikveco japanaj Imperiestroj tre ofte ricevis orakolon dum sia regado. Vere la regado devas esti farata tute laŭ Dia Volo kaj pro tio Oomoto deklaras la koincidigon de religio kaj politiko.)

Ambaŭ gefratoj estis egale tre lojalaj. Kiam ili ricevis tiom gravan mision, ili do jam sin decidis, ke ili neniam timos forĵeti eĉ la vivon, por la Imperiestra familio kaj la tuta nacio. Ĉe la ekiro de Kijomaro al la sanktejo Usa-Haĉiman, Dookjoo klopodis allogi lin per diversaj dolĉaj vortoj, per ĉiuj eblaj rimedoj, sed tamen post ĉio ne sukcesis por delogi lian koron firman kiel fero.

Tiutempe Huziŭara Nagate kaj Kibi-no-Mabiki estis ministroj plej altrangaj sub la ĉefministro. Kvankam la unua estis tre altklasa nobelo kaj la alia talenta scienculo, tamen ili, subigintaj antaŭ la potenco de Dookjoo, neniel kuraĝis riproĉi lian malbonagon. Dume Kijomaro, kiu estis simpla vasalo ankoraŭ kun nealta rango, kuraĝis ĉion fari pro justeco: forpelinte ĉiujn allogojn de Dookjoo, neniom timante persekutojn minacantajn lian vivon, li raportis kun nenia hezito la tutan orakolon de Usa-Haĉiman antaŭ la trono.

« Depost la fondiĝo de Japanujo ekzistas absoluta difino pri la rilato inter suvereno kaj popolo. Neniam okazis anstataŭigo de suvereno per la popolo. La trono nepre devas esti heredata de la rekta linio. Senmorala impertinentulo ja devas esti tuj forigita. »

La justeco de Kijomaro estis nenio alia ol arda lojaleco. Se ne ekzistas tiam la sincereco de Kijomaro, kio do okazus en la japana historio?! Kiel fariĝis la unika sankta trono tute seninterrompa, kiun japanoj nun fieras en la mondo? La sorto de tuta Japanujo verdire ja dependis de tiuj ĉi vortoj de Kijomaro.

Aŭdinte tiun ĉi ĝustan raporton de Kijomaro, estante apud la trono, Dookjoo ege koleris. Lia indigno nun atingis la zeniton kiel bruleganta flamo. Kijomaro ricevis diversajn ofendojn de Dookjoo. Baldaŭ li estis eksigita



Kijomaro raportas la orakolon
antaŭ la Trono.

de la ofico kaj ekzilita al malproksima suda insulo. Krom tio Dookjoo atencis kontraŭ li survoje sed subite okazis forta uragano kaj la celo ne plenumigis. Certe Dio gardis la lojalulon. Same ankaŭ lia fratino Hiromuŝi estis ekzilita al okcidento kun multaj ofendoj. Kompatinde ili estis severe kulpigitaj sen kulpo kaj devis vivi mizeran vivon. Tamen dank' al ilia lojaleco la kulpa plano ne plenumigis.

La sakvantan jaron, okaze de la surtronigo de la Imperiestro

Koonin, la malbonulo Dookjoo estis tuj eksigita el la alta rango kaj farigis bonzo de malgranda templo en Simozuke, kie li mortis tri jarojn poste. La tombo ankoraŭ nun troviĝas tie, tamen neniu prizorgas ĝin.

Ambaŭ fidelaj gefratoj baldaŭ revenis la Kortegon kaj recevis altan rangon. Ili servis ĉiam pli diligente kun despli granda konfido. Kijomaro konsilis translokigon de la ĉefurbo el Nara al Kioto. La tiutempa Imperiestro Kanmu konsentis tion kaj denove Kioto farigis la ĉefurbo dum pli ol 1700 jaroj.

Post la morto de Kijomaro oni starigis solenan sanktejon nomatan « Go-Oo » (gardo-reĝo), kie oni apoteozis lian noblan animon kune kun tiu de lia fratino Hiromuŝi. La sanktejo troviĝas en la urbego Kioto (tre proksima al Oomoto Centro) kaj multaj japanoj vizitadas ĝin ĉiutage.

Tiel la granda nomo de la fidela vasalo Kijomaro ĉiam brilas kaj brilos por eterne en la japana historio.

Revivigo de mia filo

Ĉ. Aŭacuĵi, Kioto.

« Jes, prave, ke Dio eterne favoras nin. Tamen por malsanulo certe necesas medikamento... » mia edzino asertis senpacience. Ĉar mi forte kredis en la koro, laŭ ĝisnunaj spertoj — se ni tutkore preĝos Dion, certe Li favoros nin — mi tuj respondis sin.

« Silentu! Tiu, kiu estas destinita je morto, nepre mortos, eĉ se oni donos medikamenton. Kaj plie, ĉu ne, li estas nia propra filo; neniuj riproĉos al ni, se li mortos. Dirante nenion ni observu la staton de lia malsano por kelka tempo... »

« Vi ĉiam diras, atendu, atendu por kelka tempo. Jen kiom da tagoj jam pasis? Oni diras, ke tifo estas tre danĝera: se tro malfruigos, jam ne eble resanigi... »

« Ba, ne diru malsaĝon! » Ekstreme koleriginta mi fine disrompis la apudan termometron, jetinte ĝin sur plankon. Tiom forte mi kolerigis: tamen verdire ni havis jam ses tifulojn en tiu ĉi jaro el niaj parencoj kaj ili ĉiuj mortis. Kaj nun mia filo Rjuuzo fariĝis same malsana por la sepa vico. Do tute nature, ke mia edzino fariĝas tre nerveca. Ĉar mi bone sciis tion, ni baldaŭ repaciĝis. Tiamaniere ni ofte ripetadis diskuton pro malsano de la filo.

Kial mi tiom forte persistis eĉ diskutante kontraŭ mia edzino, ke ne necesas doni medikamenton? Ĉar ne nur mi konvinkiĝis pri tio laŭ mia sperto, sed mi havis firman memfidon kredi pri ricevo de Dia favoro.

Kvankam mia Rjuuzo malsaniĝis, ni ne povis ekskluzive flegadi lin pro ĉiama okupiteco. Ni do decidis venigi flegistinon. Tamen por speciale venigi iun, Oomotanino estos pli bona, mi pensis. Ĉar se Oomotanino, ni jam estas pli intimaj kaj ŝi havas profundan konvinkon pri Dia favoro. Post iom da pripenso, ni decidis peti s-inon Jasui en Ajabe (sidejo de Oomoto Centro), ni telegramis. Ŝi volonte akceptis tion kaj venis al ni jam en tiu tago. Antaŭ la veturo, s-ino Jasui parolis al Sinjorino Naohi (edzino de Sinjoro Hidemaru) kun adiaŭa saluto. Ŝi tre simpatiis mian filon kaj farinte

« Ohineri »[◆], preĝis antaŭ la altaro (kie oni apoteozas la animon de Oomoto-Fondintino). Kaj Ŝi donis ĝin al ŝi kun la diro: « Bonvolu doni tion ĉi al la malsana knabo ». Rakontante tion s-ino Jasui transdonis tiun « Ohineri » al ni. Mi estis ege kortuŝita pro ŝia troa boneco kaj povis nenion fari krom nur kunmeti la manojn por esprimi dankemon.

En tiu momento mi eksentis: Sinjorino Naohi profunde pripensas pri mia malsana filo. Ni tutkore preĝu, ĉion apogu al Dio. Ni devas resanigi lin per la forto de nia firma kredo. Jes, ni devas... Ne nur ni varme preĝis Dion, sed ankaŭ malgranda Rjuuzo, ankoraŭ dek-jara, oferadis preĝvortojn kun speciala peto al Sankta Sinjoro (kiu estas la nuna majstro O. Deguĉi — tiel Oomotanoj nomas lin). « Sankta Sinjoro! Hodiaŭ mi sentas doloron ĉe la brusto. Bonvolu resanigi min laŭ Via favoro!... » Ofte kaj longe li preĝis tiel. Ĉiutage li ripetadis tion. Kaj lia sintenado dum la preĝo estis vere nobla, impona. Ni estis despli emociitaj, ĉar li estas ankoraŭ malgranda 10-jara knabeto. Tro laŭdi mian propran filon — ŝajne estas iom stranga, tamen ni havas nenian vorton alian.

Dum lia malsano, plej laŭdinda estas tio, ke li neniam postulis manĝi, ĉiam obeante al konsilo de s-ino Jasui. Oni diras, ke tifuloj sentas severan apetiton tuj kiam foriras febro kaj ne povante toleri tion ili ofte malsukcesas resanigi pro manĝado. Tamen Rjuuzo bone toleris ĉion. Iam vizitanto venis. Aŭdinte la interparolon, li demandis: « Kiu vizitis? » « Jes, s-ro A, s-ro B... » « Kion li donis al mi? » Por tia demando, ne povante kaŝi: « Frukton, kaj kukon... » tiamaniere ni devis respondi. Tiam li tuj diris: Do, oferu ilin antaŭ la altaro, ĉar mi ne devas manĝi ». Aŭdante tian rezigneman parolon de la filo, ni jam ne povis reteni larmojn.

La 13an de Majo, li malsaniĝis. Post unu monato s-ino Jasui iris hejmen, tiel rapide li resaniĝis. Komence ni donis « Ohineri » dufoje en unu tago kaj ĉe la fino de tiu semajno febro jam fariĝis tute malalta. De tiam li

◆ « Ohineri » estas paperpeceto, sur kiu estas skribite ideograme « Oomoto-Dio ». Malsanulo ĝin englutas kun preĝo Ĝin faras Sinjorino Naohi nuntempe.

fervore petis nin: « Legu la gazeton "Kami-no-Kuni" (Dia Regno), legu la librojn "Rakontoj el la Spirita Mondo" aŭ "Meiko" ktp. (Ili estas verko de la Majstro aŭ organoj de Oomoto). Li volas tion pro enuo. Li ne komprenus ilin. Estante tiel juna, oni ĝenerale deziras infanajn librojn. Tamen baldaŭ mi komprenis ke lia deziro estas el piema koro. Rememorante tion mi ĉiam sentas lian imponan sintenadon tiaman.

Baldaŭ en nia parenco, ankoraŭ unu malsaniĝis je fito. Damage tiu ĉi ankaŭ mortis. Entute ok fariĝis tifuloj kaj sep mortis. Restinta nur unu, mia filo, fine resaniĝis, sen iu medikamento. Pensante ĉi tion, ni estas ĉiam tre dankemaj, ke la resaniĝo de mia filo estas nenio alia ol Dia granda favoro. Tiel ni Oomotanoj pasigas ĉiun tagon en senlima graco kaj dankemo.

(Trad: K. Mineno)

SALUTO EL LA LANDO DE ĴAMBOREO!

Vin certe interesas, ke la oficiala gazeto de la Hungara Skolta Asocio enhavis sekvantan frazon en la aŭgusta numero:

« Ĉiuj, kiuj ne havis okazon kaj eblecon lerni ian fremdan nacian lingvon, faras bone, se ili lernas almenaŭ Esperanton kun sufiĉa diligenteco ĝis la jamboreo. »

Jen opinio el la jamboreon-aranĝanta lando. Multaj ne povas lerni el la skoltfratoj ian nacian lingvon, do proponu al ili, ke ili lernu Esperanton kaj uzu ĝin por krei veran skoltan harmonion!

GLUMARKOJ pri la esperanto-kunveno de la jamboreo estas haveblaj! Favora prezo ĝis novembro: 20 ekz. por 1. poŝta resp. kup. 100 ekz. por 4 poŝta resp. kup.

Poŝtkartoj pri Budapeŝt kun Esp. teksto 10 por 4 resp.kup. Fotoalbumeto por 4 resp.kup., simila el hungara popolvivo por 5 resp.kup.

ESTU MEMBRO de « Skolta Esperantista Ligo » kaj legu ties Bultenon. Jare ŝil. 1—. adreso: D. H. Davis, 23. East Dulwich Grove, London S. E. 22. England, Anglujo. Helpu nian laboron, sendu por tiu cirkuleroj minimume 1 resp. kup., sed laŭeble pli por jamborea laboro!

Nepre skribu al ni, ni atendas vian respondon kaj

skoltfrate salutas vin

« Bonan laboron! »

Paŭlo Balkanyi, Budapeŝt, poŝto 507.
hungara repr. de SEL

HUNGARA SKOLTA ESPERANTO-STUDRONDO, Budapeŝt,
V. Nagy Sandor-u. 6.

PER ESPERANTO TRA JAPANUJO

Jozefo Major

Vojaĝraporto (9)

La 2an de sept. ni vizitis la urbeton **Isahaja**, kie malsana samideano tre deziris nin vidi. « Se Mohamed ne iras al la monto, la monto venas al Mohamed » — kaj tiel estis. La saman tagon ni veturis al la mondfama loko **Unzen**, ni uzis pramalnovajn vagonaretojn kaj fine aŭtomobilon, kiu veturigis nin al ĉ. 1000 metra alteco, kie kuŝas la banloko. Tie estas grandaj eŭropstilaj hoteloj, kien vizitas homoj el ĉiuj landoj por vidi la mirindaĵojn de la vulkanaj fenomenoj (varmegaj fontoj, vapor-erupcioj kaj koto bolanta). Ni ekloĝis en modesta japana gastejo kaj la morgaŭan matenon supreniris la montegon Fugendake, ĉ. 3000 metrojn altan. Survoje ni konatiĝis al tre inteligenta fraŭlino el Osaka, kiu nuntempe (kiam mi skribas tiun ĉi raporton, do post la vojaĝo) sekvas Oomoto-kurson en Kameoka. Tia estas la forto de nia movado, ke homoj aliĝas al ĝi nur post unufoja kontakto kun iu el niaj propagandistoj. Sur la deklivo de tiu ĉi montego troviĝas unu el la plej sanktaj ŝinto-sanktejoj de la lando, en unu el la plej belaj, se ne la plej bela ĉirkaŭaĵo. Fine ni forlasis la belegan lokon Unzen kaj malsupreniris la alian flankon de la montaro ĝis **Simabara**. Vespere okazis kunveneto en la Oomoto-filio de tiu ĉi urbo kaj la morgaŭan matenon ni enŝipiĝis por traveturi la markolon ĝis Misumi, de kie ni per vagonaro atingis **Kumamoto**-urbon. La kutima grupo de geamikoj nin bonvenigis. En tiu ĉi urbo ni renkontis Esperantistinon el Formoso, kiu lernis nian lingvon en tiu kolonio de unu el propagandistoj senditaj tien de Oomoto. Tuj ĉe la alveno ni propagandis ĉe du gravaj ĵurnalejoj, kiuj poste publikigis bonajn artikolojn pri nia vizito. Vespere okazis bankedo laŭ japana maniero por ĉ. 20 personoj, poste, en la eleganta kaj impona publika domo de la urbo okazis mia publika parolado ĉ. antaŭ 100 personoj. La 5an de oktobro okazis parolado ĉe la loka knabina liceo antaŭ ĉ. 300 lernantinoj precipe pri virinaj temoj. Tiun ĉi vesperon okazis mia radioparolado ĉe la centra stacio por Kiuŝu; s-ro Eguĉi el Fukuoka bonvolis speciale alveturi per ekspresvagonaro por traduki mian prelegon pri Hungarujo... Post tiu parolado okazis kunveno por Esperantistoj kun ĉ. 20 partoprenintoj, fine kunveneto por Oomotanoj en la domo de la filio — laciga tago! La morgaŭan tagon ni vizitis la krateron de la vulkano Aso kaj kvankam en tiu ĉi oficiala raporto ne estas loko por turismaj aferoj, mi ne povis flankenlasi tiun ĉi grandiozan ekspedicion. La saman tagon ni alvenis



S-ro J. Major en Kagoŝima, ĝardeno de S-ro Ajisaka,
direktoro de Kagoŝima Asahi Ŝinbun — ĵurnalo

al la Oomoto Domo en **Joŝimacu**, centra Domo por Kiuŝu. Kiel ĉiuj Oomoto Domoj, tiu ĉi ankaŭ havas sian individuan karakteron, situanta en rava pejzaĝo; oni vidas la bluajn konturojn de la vulkano Aso kaj de la montaro de Unzen, kiuj ni supreniris antaŭ nelonge. Kiel en ĉiu Oomoto Domo; oni trovas tie ĉi ankaŭ la templon por kelkcent personoj, la pensionon por vizitantoj, iom pli luksan domon por gastoj kaj apartamenton de la Majstro, baĵejojn, pentrindan ĝardenon kun lago kaj rivereto, en kiu oni sin lavas, tre simpatiajn laboroferantojn, kiuj konstante loĝas tie kaj zorgas pri la administrado kaj propagando, ktp.

La 7an de okt. ni veturis al la industria urbo **Oomuta**, kie la Esp. movado estas tre vigla dank' al la entuziasmo de D-ro Ueda kaj aliaj. Okazis tre gaja komuna vespermanĝo ĉe la grupo kun 25 ĝe-partoprenantoj, poste pli intima kunveneto ĉe la gastama domo de la jam nomita doktoro, ĝis malfrua horo. S-ro Araki montriĝis elokventa oratoro per sia parolado ĉe la vespermanĝo, en kiu li trovis rimedon miksi min kaj... Konfucion! La morgaŭan tagon okazis mia parolado ĉe la loka komerca kolegio kun 500 lernantoj; je la peto de la estraro mi devis paroli dum kvaronhoro en angla lingvo — sed kvankam mi klopodis uzi la plej simplajn vortojn kaj parolis malrapide, la profesoro de angla lingvo tute konfuziĝis tuj ĉe la komenco kaj transdonis la lokon al mia fidela akompananto O-aki, kaj la parolado perfekte sukcesis — dank' al Esperanto. Oni tamen ne devas tro kondamni la malfeliĉan profesoron, ĉar eĉ lertaj Esperantistoj ofte malsukcesas traduki miajn paroladojn pro tio, ke ili ne estas alkutimiĝintaj al publika parolado kaj ne konas la temon pri kiu mi parolos. Mi konvinkiĝis per la sperto, ke estas preferinde kunvojaĝi kun sperta tradukisto ol sin fidi al pli aŭ malpli lertaj nekonataj samideanoj ha-

zarde renkontataj survoje. En tiu ĉi punkto mi vidas la kialon de kelkaj malsukcesoj, kiujn onidire rikoltis s-ro Scherer dum sia rondvojaĝo en Japanujo antaŭ du jaroj.

Malgraŭ la grandega distanco, ni decidis viziti la plej sudan urbon de Kiuŝu, la havenon **Kagosima**, kien ni alvenis la 8an de okt. La saman vesperon okazis komuna vespermanĝo ĉe la loka Oomoto domo kaj kvankam la manĝaĵoj estis modestaj, ni ĉiuj sentis nin en familia, vere frata etoso. Komprenoble, vespermanĝo signifas ĉiam paroladon por mi — tra mia tuta raporto. Kaj ĉiu parolado estas nedirekta propagando por Esperanto, kiun mi senescepte uzas. La morgaŭan tagon ni vizitis al la sola bona Esperantisto de la urbo, s-ro Ŝigemacu, kiu malgraŭ sia alta aĝo montras admirindan ekzemplon al la nuna mallaborema generacio. De 20 jaroj li ne parolis al fremda samideano, tamen li babilis kun mi en tre flua Esperanto pri la lastaj eventoj de nia literaturo. Jen estas pruvo por tio, ke legante oni sin tenas en perfekteco, eĉ ne havante okazon por parola ekzerciĝo. Tiu ĉi samideano estas la plej maljuna pioniro de nia movado en Japanujo, nun vivanta.

La 10an de okt. post tre longa vojaĝo en malrapida vagonaro ni alvenis al la dua mondfama loko de Kiuŝu, al la banurbo **Beppu**. Tie ni estis akceptataj de D-ro Aso kaj D-ro Ŝimogawara, kaj kelkaj aliaj gesamideanoj, kun kiuj ni amike babiladis dum la vespero. La morgaŭan tagon ni prenis la vaporŝipon, kiu kondukis nin al Osaka, tra la ravaj markoloj, inter feaj insuletoj de la Interna Maro de Japanujo. Tie finiĝis mia longa veturo tra Japanujo, kies sekau resumon mi donis ĝisnun en tiu ĉi gazeto. Poste mi veturis al Tokio, kie mi ĉeestis la Japanan Esp. Kongreson, pri kiu ni am raportis aliloke. Ĉe la fino de mia raporto mi devas rimarkigi, ke estas plauata mia vojaĝo al la Kolonioj kaj al Mauĉurio por la proksima estouteco. Unu el niaj propagandistoj, s-ro Jasuo Niŝimura jam antaŭiris min al Mauĉukuo. Pri mia ĝisnuna vojaĝo tre baldaŭ aperos mia libro, sub la titolo «Tra Japanujo», kiu klopodos doni veran bildon pri la Lando de la Leviĝanta Suno, dank' al la informoj ricevitaj pere de Esperanto kaj Oomoto. Ĉe la fino mi devas refoje danki ĉiujn radiostaciojn, ĵurnalejojn, lernejestrojn, Oomotanojn, Esperantistojn kaj tute aparte miajn kvar akompanintojn, s-rojn Otaka, Jamakaŭa, Inoue kaj Osaki por ilia fidela tradukado kaj mil servoj, kiujn ili ne malŝparis por mi dum niaj longaj komunaj veturoj. Mi ne devas ankaŭ forgesi danki la Oomoto movadon, sen kies morala kaj materia helpo tia grandioza vojaĝo estus ja neebla; kaj dankante la Movadon mi ne povas forgesi la Majstron, kiu havas plenan komprenon pri la utileco de mia Esp. propagando, samkiel la ceteraj ĉefoj de Oomoto.

Kameoka, fino de 1932, Jozefo Major.

Mi reviviĝis tiel...

Lastatempe ni ricevis la leteron de S-ro K. Petror, la ĉeĥoslovaka samideano kaj komunikis al ni pri sia reviviĝo ekabonante nian gazeton Oomoto. Ĝin ni publikigas ĉi sube. La Redakcio.

Mi elkore vin dankas pro via regula sendado de nia ŝatata gazeto Oomoto. Ĉiam mi kun plezuro kaj granda atento legas Oomoto'n. Nun ricevinte novan numeron mi ekĝojis tiel multe, kvazaŭ ne Oomoto'n mi ricevus sed nian Majstron Onisabro Deguĉi mi vidus. Eble, ŝajnos al vi iomete stranga mia letero, karaj fratoj, mi do malkaŝos antaŭ vi pri mia suferinta animo. Mi devas diri al vi nome tion, kio okazis kun mi depost la ricevo de nia ŝatata Oomoto.

Antaŭe mi nenion sciis pri via movado kaj kompreneble mi tute alimaniere pensadis pri la nuna mondŝtato kaj pri Dio mem.

Ambaŭ numeroj kiujn mi ricevis unue, kvazaŭ renversis mian tutan animon. De ili mi povis kompreni, ke la espero savi la homojn ankoraŭ ne estas perdita, se estas vera ŝipestro sur tiu ĉi giganta ŝipo: la Tero.

Tiam, antaŭ mi ekstaris la figuro de nia kara Majstro, Onisabro Deguĉi. De tiam li fariĝis savanto de mia senapoga animo kaj mi ekamis lin, kiel Dion mem.

Malgraŭ, ke mi tro malmulte scias pri li kaj pri Oomoto-movado mem, mi vidas bone, ke tiu ĉi religio estas la sola, kiu savos la jam agoniantan homaron.

Mi soife legas ĉiun ricevitan numeron, kiun vi afable sendas al mi, kaj mi preskaŭ parkele ellernis ĉion skribitan de nia kara Majstro.

Mi havas ardan deziron traduki kelkajn verkojn de Majstro O. Deguĉi, sed mia nuna cirkonstanco tute ne permesas al mi plenumi tion tuj. Mi estas tre malriĉa kaj antaŭe mi pensis, karaj fratoj, ke mi estas la plej kompatinda homo.

Ĉiuokaze, tamen, malgraŭ la malriĉeco mi estas jam

feliĉa, ĉar mi sola ja ne estas malriĉa en la mondo. Mi nun tre ĝojas ke mi povis ekkoni la veran irendan vojon. Esti malriĉa ja ne estas honto! Honto estigas nur tiam, kiam ni estas riĉaj sed ne kompatemaj kaj senkredaj. Tre plaĉis al mi la vortoj de nia Majstro, kiu pri tio jene esprimis sin:

«Homoj riĉaj, sed sen kredo estas pli kompatindaj.»

Per via gazeto Oomoto vi ĉiam liveras bonan materialon ankaŭ por lernado, kaj mi ne povas resti ne dankante kore al vi.

Al miaj bonaj amikoj mi jam parolis pri Oomoto, pri Majstro kaj la Fondintino. Ili ekinteresiĝis tiom multe, ke preskaŭ ĉiam, kiam ni promenas kune mi estas devigata rakonti al ili pri la Nova Majstro reveninta jam de longe inter ni surtere. Sed je mia bedaŭro, mi mem ankoraŭ ne estas instruita por ke mi povu sciigi al miaj amikoj kontentige! Ĉiuj nun do komencis eklerni Esperanton, por ke pere de nia kara lingvo ili mem ekkonu rekte Oomoton. Tre baldaŭ ili ekposedos nian lingvon kaj mi kredas, ke ili ankaŭ certe abonos la gazeton Oomoto.

Fine, mi ankoraŭ unufoje esprimas mian dankon kaj promesas al vi ke denun mi decide klopodos varbi abonantojn kaj simpatiulojn por la plej bonenhava gazeto en Esperantujo.

Esperante, ke mi estas pardonita por mia longa silentado, mi restas kun,

Sinceraj salutoj,

K. Petror

RENOVIGU VIAN ABONKOTIZON POR
“O O M O T O” 1933

Ĉiu paginto ricevas premiojn!

La Administracio.

Kurso de Japana Lingvo por Esperantistoj

(6)

Pri ideogramoj (Daŭrigo)

Parte karakterizaj kaj parte simbolaj ideogramoj:

En la sekvanta tabelo ni montras ideogramojn, kiuj estas facile memorigeblaj dank' al la fakto, ke ili estas parte karakterizaj:

ideogramo:	elparolo:	signifo:	karakterizo:
東	higaŝi	oriento	suno 日 (hi) malantaŭ arbo 木 (ki)
休	jasumu	ripozi	homo 人 (hito) apud arbo 木 (ki)
間	aida	inter	pordego 門 (mon) kaj suno 日 (hi)
土	cuĉi	tero	du tavoloj kun io kreskanta
兄	ani	pliaĝa frato	buŝo 口 (kuĉi) sur du piedoj
言	kotoba	vorto	rigardu la buŝon 口 (kuĉi)
明	akarui	hela	suno kaj luno
鳴	naku	pepi	buŝo kaj birdo

Speciale oni atente distingu la sekvajn simbolojn, kiuj estas similaj:

ideogramo: 口 buŝo 夕 vespero 二 du 八 ok 十 dek
katakana: 口 ro 夕 ta 二 ni 八 ha ナ na

Personaj nomoj en japana lingvo ĉiam estas skribataj per ideogramoj, tial ili havas ankaŭ signifon. Japanoj ofte demandas Eŭropanojn pri la signifo de ilia nomo! Unue oni skribas la familian, poste la propran nomon, do kontraŭe al okcidentaj kutimoj. Kelkaj oftaj nomoj (familiaj), kies « signifon » la lernanto jam povos diveni:

川田 Kaŭada (atentu pri la « nigori »; t ŝanĝiĝas je d ktp.)

山口 Jamaguĉi 田中 tanaka 中山 Nakajama

山川 Jamakaŭa ktp.

出口 Deguĉi, la nomo de nia Majstro estas kunmetita el 出 (eliri) kaj 口 kuĉi (buŝo); tial ĝi estas skribita ĉe ĉiu... fervoja stacio!

Rimarko: Personaj nomoj ofte estas malregule legendaj, tiel ke Japanoj mem devas konsulti la apudmetitajn silabajn signojn.

Japana kaj Ĉina Elparoloj.

Ni alvenis al malfacila punkto, sed per logiko ni esperas ĝin venki. La ideogramoj uzataj en la nuntempa japana literaturo havas ĝenerale

du malsamajn elparolojn : «kun» aŭ japana- kaj «on» aŭ ĉina-elparoloj. La «ĉina» elparolo signifas la parolmanieron de antaŭ 1500 jaroj — kiu eble tute ŝanĝiĝis ĝis la nuna tempo. Oni do ne povas vere diri pri tiu parolmaniero, ke ĝi estas «ĉina», pli bone uzi «kun» kaj «on».

Ekzemplo : 人 jam estas bonekonata ideogramo por «hito» (homo), tio estas la japana elparolo («kun»). Kiel ni diris, ekzistas ankaŭ «ĉina» elparolo («on»), kiu estas tie ĉi NIN (kiu signifas ankaŭ homon en tiu ĉi kazo). Por ne ripeti ĉiam la vortojn «kun» kaj «on» ni presigos denun la «on» (ĉinan elparolon) per majuskloj (grandaj literoj), kiel la supra NIN.

La lernanto verŝajne nun demandos al si kiel oni scias, ĉu legi «hito» aŭ «NIN», vidante la signon 人. Bedaŭrinde, ne ekzistas regulo por tion scii. Antaŭ ol legi japane, oni devas paroli. Ĉio dependas de kutimo. La fremdulo devas ĉion lerni iom post iom, ĝis li akiros la saman «legosenton», kiun posedas Japanoj. Japanoj mem konfuziĝas en multaj okazoj, tial — precipe en la popularaj gazetoj — oni presas la elparolon per «kua» apud neoftaj ideogramoj.

Interese estas ankaŭ rimarki, ke tiaj helpsignoj troveblaj en popularaj japanaj literaturaĵoj, kelkfoje ne estas la elparolo, sed la signifo (per sinonimo) de la vorto! Bela komplikajo, ĉu ne? Sed lernebla, kun pacienco — kiel pruvas pluraj fremduloj, kiuj preskaŭ perfekte ellernis la japanan lingvon... post kelk-dek-jara laboro!

MI SERĈAS TRADUKANTO.N

en la regionoj, en kiuj oni legas ĉi tiun gazeton.

Ili devas :

1. esti kapablaj, bonŝile kaj elegante traduki artikolojn verkitajn en Esperanto en sian nacian lingvon ;
2. havi bonajn interrilatojn al gravaj gazetoj (ĉiutagaj aŭ periodaj) de sia lando, por instigi ilin al publikigo de artikoloj, kiuj rilatas ekonomiaju, industriaju kaj komercaju aferojn kaj estos laŭ sia enhavo valoraj kaj de publika intereso. —

Tiuj samideanoj, kiuj estos pretaj, labori kun mi (por entrepreno cetere ankaŭ valora por nia Esperanto-propagando), estos petataj, skribi al mi tre baldaŭ sian adreson, por ke mi povu informi ilin pri mia laborplano, kaj por ke mi povu interrilati pri la reciprokaj kondiĉoj.

Kun samideana saluto

Prof. Dr. Dietterle
Leipzig
Beethovenstr. 19.

Heroldo de Oomoto kaj U.H.A.

★ La 16-an de Okt. la Manĉuria Federacio de Esperantistoj okazigis la kvinan ĝeneralan kunsidon en la aŭditorio de la Medicina Universitato en Mukdeno. Ĝin partoprenis ankaŭ S-roj Sugamaru Deguĉi, Jasuo Nišimura kaj kelkaj aliaj membroj de UHA. Reprezentantian movadon S-ro Sugamaru faris esperantan saluton kaj poste S-ro J. Nišimura parolis pri Oomoto kaj Esp., UHA-movado okaze de la konfliktoj en Manĉurio kaj Ŝanhajo kaj cetere pri la vigla propagandstato de Esperanto-Propaganda Asocio. En la kunveno multaj proponoj estis prezentitaj kaj el la aprobitaj estas menciindaj:

La Manĉuria Federacio de Esperantistoj unuanime decidis klopodi

1. por proponi Esperanton kiel la oficialan lingvon de Manĉukuo.
2. por abolicii la anglan lingvon.
3. por enkonduki Esperanton en Manĉurian Fervojojn kaj Kantung Gubernion.

★ Post la Oomoto Aŭtuna Festo, la 15-an de Nov., nia Majstro O. Deguĉi forveturis laŭ la fervora invito de lokaj Oomotanoj al la nordorienta distrikto, unue al Jamaŝiro, banloko. Tie la tuta vilaĝano kvazaŭ porfeste akceptis lin kun varma bonvenigo. La sekvan tagon li enketis la terenon (80,000 kvadratmetrojn vasta), kiun oni donacis al Oomoto por la konstruo de Oomoto-Domo. Poste li veturis al Tokio, survoje vizitante tien kaj reen dum du monatoj pro ardaĵ deziroj de la lokaj kredantoj. Dum la tuta vojaĝo li, preskaŭ ĉiutage diktis multajn poemojn, kiujn oni poste aperigos en la japanlingva organo de Oomoto. Fininte sian vojaĝon, li revenis al Kameoka en la 15-a de Dec.

★ La 24-an de Nov. S-ro J. Major ekveturis al Formoso por partopreni la Formosan Esperanto-Kongreson, kiu okazis de la 2-a de Dec. En la komenco de la venonta jaro li transiros al Ooŝima, la insuletaro kiu troviĝas norde de Formoso, kaj tie renkontiĝos kun S-ro Hidemaru.

★ La 13-an de Dec. S-ro Hidemaru Deguĉi forveturis al Ooŝima.

★ Jam kelkaj monatoj forpasis de kiam S-ro K. Kakehi ekvojaĝis al Siamo kaj nun li propagandas en Bangkok. Li klopodas ĉiutage ankaŭ por nia Esperanto movado.

★ Lastatempe en Ten'on-kjo estis organizita la Oomoto Orkestro sub la gvido de S-ro Murata, famekonata muzikisto en Japanujo. Jam delonge li indignis pri la degenero de la nuntempaj artistoj kaj aŭskultinte Oomoto-lekcion li ekkonis ke Oomoto estas ja granda religio de arto kaj decidis sin retiri de la muzika socio por sindoni por nia sankta movado, precipe por komponi multajn versaĵojn de nia Majstro. Jam kelkaj kantoj estas fonogramitaj.

★ Generalo Chang Haipeng, la Ĉambelanestro de la Prezidanto de Manĉukuo kaj la estro de Tao'nan-filio de Universala Ruĝsvastika Asocio, lastatempe vizitis Japanujon kun aliaj veteranoj por rigardi en la nomo de la nova ŝtato la grandan manovron, kiu lokon havis de la 10-a de Nov. Spite la okupitan vojaĝon de oficialaj aferoj, li vizitis Oomoto Centron en Kameoka en la 6-a matene kun arda sopiro kaj li estis varme akceptita kaj bonvenigita de nia Majstro. Plenuminta sian delongan deziron, li forveturis al Tokio, kie li havis la honoron ricevi aŭdiencon al Mikado. Post la manovro li hejmeniris al Manĉukuo, lasinte al ni la promeson ke li certe faros al ni la devonan viziton en la baldaŭa estonteco.



La 5-a ĝenerala kunsido de Manĉuria Federacio de Esp-istoj.

Recenzoj

Libroj :

★ Esperanta Teknika Medicina Vortaro de Dro Briguet, eldono de la Internacia Medicina Revuo, 255 Av du Lonchamp, Bruxelles, Belgujo. Grava verko : 360 paĝoj, 3675 vortoj kun derivaĵoj kaj klarigoj en Esperanto, okaze ankaŭ nacilingve. Prezo : bindite 2 dolaroj. Havinda ne nur de kuracistoj, sed ankaŭ de ĝeneralaj Espistoj ĉar la terminaro de medicino tendencas pli kaj pli ĝeneraligi.

★ La langue international. Eldono de la Belga Esp.-Instituto, XII, Rue du Petit Chien, Antverpeno, Belgujo. Prezo : 5 frankoj. Esperanta represo de « Esenco kaj Estonteco de la ideo de lingvo internacia » de Unuel, pseudonimo de Zamenhof. Franca traduko estas paralele aldonita. Taŭga propagandilo por franclingvanoj kaj eble ekzerciloj por studentoj de la franca lingvo.

★ De Internationale Tall. Sama eldono kaj sama prezo kiel la supra libro. Esperanta teksto kun nederlanda traduko.

La sekvantaj germanlingvaj libroj venis po 1 ekz. Ni do ne povas pli detale recenzi ilin : Bruderschaft von H. Rudolph, Theosophischer Kulturverlag, Leipzig. La sekvantaj broŝuroj aperis ĉiuj ĉe Neugeist, Pfullingen, Germanujo : Das Lebenselixier von Dr Prakticus ; Die tagliche Massage von Strube ; Neugeist als Lebensmacht von Verweyen-Bonn ; Der Traumspiegel von Dr Lomer ; Der Stumme Bruder von Heinz Nonveiller.

Gazetoj :

★ Lingvo Internacia, Ateno, Grekujo. Julio. Enhavas kuraĝan artikolon pri Reorganizo de la redaktoro, s-ro Anakreon Stamatiadis. Sed ni ne povas sekvi s-ron Stamatiadis en la bagatelajn disputojn kun I.C.K. pri negravaj aferoj, kie li paradokse parolas pri... vulkano kaj lafo!

★ The British Esperantist, angle kaj Esperante, Sept. Enhavas recenzon pri De Paĝo al Paĝo (vidu nian studon aperintan en la lastaj du numeroj de nia gazeto), subskribitan de Sturmer. Estas bedaŭrinde, ke oni daŭre permesas al tiu sinjoro abuzi sur la paĝoj de serioza gazeto. Li nun atakas la bulgaran nacion, skribante : « Ĉu la bulgara literaturo, kiun verŝajne nia jam multe superas, aŭ la plej alta nivelo de la angla, kiun eble neniam atingos ? » Oni komprenu — malgraŭ la gramatika eraro (forlaso de la artikolo antaŭ « nia »), ke Sturmer asertas, ke la esperanta literaturo jam superis la bulgaran

kaj neniam superos la anglan literaturon. Kia insulto al fremda kaj kia flato al la propra nacio! Ni cetere dubas pri ambaŭ flankoj de tiu ĉi blaga aserto: ni scias, ke Bulgaroj havas tre valoran literaturon — kaj Angloj pretendas havi tre valoran sed efektive ne posedas la plej altnivelan literaturon en la mondo. — Fine Sturmer, laŭ sia kutimo, impertinente laŭdas sin mem, skribante, ke li jam de ses jaroj juĝas pri esperantaj libroj « laŭ la kriterioj de la plej evoluinta tavolo de la okcidenteŭropa literaturo nacilingva ». Ni ree vokas al la publiko: « Ĝis kiam? »

★ La Suda Stelo, Organo de la Esp. Movado en Jugoslavio, Aŭg. kaj Sept. Nova organo de niaj jugoslavaj samideanoj. Tiel interesa kaj bele presita, ke ni povas ĝiu rekomendi internacie.

★ Germana Esperantisto, Aŭg.-Sept.

★ Hispana Esp. Gazeto, Jul.-Aŭg.

★ Ondo de Daŭgava. Jul.-Aŭg.-Sept. Organo de la Latva Esp. Societo (Elizabetes iela 55, Riga) Rekomendinda internacie.)

★ La Suda Kruco estas la sola esperanta gazeto en la suda hemisfero. Ĝi aperadas monate en Melbourne (Aŭstralio) de pli ol dek jaroj. Tiu ĉi gazeto estas tre bone redaktata kaj ĝi ne nur kontentigas lokajn bezonojn sed meritas esti tutmonde legata. Precipe la kritikoj en ĝi estas kuraĝaj kaj altnivelaj. La aŭtoro de tiuj ĉi linioj ĉiam ĝojas, kiam li estas severe kritikata kaj se temas pri efektiva eraro malkovrita en liaj verkoj, li estas ĉiam preta ĉerpi instruon el la kritiko. Tia okazo sin prezentas nun, ĉar Suda Kruco en sia aŭgusta numero rimarkigas unu eraron (favorigi anstataŭ favori). Dankon, kolego! La verkinto de tiuj ĉi vortoj sentas sin iom konsolita rimarkante en la sama numero eraron eĉ pli grandan en teksto de... Zamenhof (restado anstataŭ kreskados). Erari estas homa.

OOMOTO siavice deziras esti agrabla al S.K., kies redaktoro plendas, ke ampleksaj kritikaj skriboj mankas en nia lingvo pro la agado de « supraĵaj banaluloj ». Nia longa studo pri De Paĝo al Paĝo estu konsolo por la simpatia redaktoro de S.K.

Sur p. 372 de S.K., kiun la kritikito kritike observis, li trovis nekompreneblan eraron. Kiel? Ĉu ankaŭ en S.K.! Klarigo de tiu eraro estas iom longa sed niaj legantoj bonvolu abonati aŭ aĉeti almanan la aŭgustan numeron de S.K. kies kaso bezonas ilian subtenon!

★ L' esperanto, Torine, Italujo. Pure itallingva propaganda organo, kiun ni bedaŭrinde ne komprenas.

★ Informoj, Organo de l' Esp. Asoc. de Estonio, Julio.

ENHAVO

Kiu eniras Ĉielregnon ?	3
Unuiĝo de Dio kaj Homo	5
Manĉukuo estas Fundamento de la Mondpaco	7
La Mondo staras sur Nocio	8
Pri Superstiĉoj	10
Japana anekdoto: Hagoromo	12
Rakontoj el la Spirita Mondo	14
Ideoj tra Esperantujo	19
Misio de la virinoj	20
Psikologio (6)	22
La Aŭtuna Festo	26
Sur Rivero Donnan	29
Ŭake-no-Kijomaro	30
Epizodo el Pivivo: Reviviĝo de mia filo	34
Per Esperanto tra Japanujo (9)	37
Mi reviviĝis tiel...	40
Kurso de Japana Lingvo (6)	42
Heroldo de Oomoto kaj U.H.A.	44
Recenzoj	46

★ Intersanĝo

Ni intersanĝas reklamon kun tutmondaj Esperantaj gazetejoj kaj ĵurnalejoj. Tiuj, kiuj volas tion fari, tuj sin turnu al ni kun siaj reklamtekstoj kaj specimena gazeto. Ni estas ĉiam pretaj por reciproka servo.

La Redakcio

Jarabono: Por Japanujo ¥ 2.40. Por eksterlando Us. dol. 1.—; sv. fr. 5.—; 24 internaciaj resp. kup. aŭ ĉiu egalvaloro.

Subtenanto: 4 jara kotizo por 5 jaroj.

Dumviva abono: ¥ 50 aŭ 20 Us. dolaroj.

La abonkotizon sendu al lokaj reprezentantoj aŭ rekte al nia Administracio. Multaj premioj dissendataj!

Reklamo: Tuta pago: sv. fr. 20.—; duona pago: sv. fr. 10.—

Anonceto: 5 linio — 2 resp. kup. Por 6 enpresoj — kvarobla prezo.

定價 壹部 貳拾錢

壹ヶ年 貳圓四拾錢

昭和七年十二月一日印刷

昭和七年十二月一日發行

編輯發行印刷人 瓜生 露吉 京都府南桑田郡龜岡町荒塚字内丸一
印刷發所行 天聲社 (替振大阪75917番) 全

OOMOTO - PROPAGANDA OFICEJO

Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

KAMEOKA, dato de la poŝta stampo.

Estimata Samidea(in)o!

Per la sama poŝto ni sendas al vi specimenon de nia gazeto OOMOTO kaj ni petas, ke vi bonvolu ĝin tralegi kun atento. Vi tuj vidus, ke OOMOTO estas unu el la plej seriozaj gazetoj en Esperanto. Nia celo estas diskonigi la instruojn de la Oomoto-Movado, pli bone konigi la malproksiman Orienton al la mondo per la internacia lingvo kaj doni modelan legaĵon al la Esperantistaro. Komence de Julio 1932 nia gazeto aperas ĉiumonate sur 48 paĝoj kun tre varia enhavo, kiel vi mem povas juĝi konsultante la specimenon. Sed ni ne volas halti ĉi tie, ĉar ni celas konstantan progreson. Ni varme akceptos viajn kritikojn kaj sugestojn kaj ni jam nun dankas vin anticipe por via bonvola kunlaboro. Komence de la nova jaro ni intencas tute renovigi nian gazeton kaj la nuna duonjaro estas kvazaŭ transira periodo al multe pli alta nivelo ankoraŭ. La estonteco estas la nia!

Ni firme kredas, ke la mondo estas savebla nur per la spirita kunfando de ambaŭ Okcidento kaj Oriento. La celo de nia gazeto estas humile kunlabori al tiu grandioza intersaĝo de ideoj — per Esperanto. Pere de nia entrepreno, la tuta Esperanto-Movado akiros grandan gloron kaj meritojn la dankon de la Homaro. Ĉu vi aŭdos nian voĉon? Ĉu vi aliĝos al la taĉmento de la Progreso? Ni firme kredas, ke jes!

Nia entrepreno ne estas bazita sur profiteco kaj mono. Ĉiuj Oomotanoj laboras senegoisme, nur por la bono de la Homaro. Nia gazeto estas presata en la granda kaj nova Oomoto-presejo de Kameoka per centoj da « labor-oferantoj » meze de vera Esperanto-Gardenurbo. La utopio de la jarcentoj jam efektiviĝis inter pitoreskaj montoj kaj valoj de Japanujo... Sed ni bezonas monon por aĉeti materialojn. Ni bezonas abonantojn. Niaj kotizoj estas la plej malkaraj — ili eĉ ne kovras la prezon de papero, ĉar Oomoto grandanime subtenas nian propagandon per Esperanto. Vi do kaptu la okazon kaj rapide bonvolu sendi vian abonkotizon kaj eventuale subtenon. Antaŭe vi ricevu nian elkoran dankon. Ĉi sube vi trovos nian novan tarifon.

Jasuo SAKURAI
ĉefredaktoro

Jozefo MAJOR
redaktoro

Abonkotizo: **Abonanto:** OOMOTO por 1 jaro: 1 usona dolaro aŭ egalvaloro.

Subtenanto: por 5 jaroj 4 usonaj dolaroj.

Dumviva abonanto: 20 usonaj dolaroj.

Multaj premioj estas konstante dissendataj.

Korespondataĵojn kaj monon sendu al la sekvanta adreso:

OOMOTO — KAMEOKA (Kioto-hu) JAPANUJO

(Ĉiu abonanto rajtas enpresigi du senpagajn anoncetojn poŝtare.)

JARKOLEKTO de 1932-a "OOMOTO"

Entute 528 paĝoj kaj 48 specialaj foto-paĝoj.

Prezo: 2.40 Yen, 1.— us. dolaro, aŭ 5 sv. fr.

Oomoto? Japanujo? U.H.A.? Japana Lingvo?...

Nepre havenda la jarkolekto por sciigi ilin.

Tuj mendu ĉe:

Oomoto oficejo, Kameoka (Kioto-hu) Japanujo.

Belaspekta ilustrita gazeto, en Esp. kaj japana lingvo

VERDA MONDO

organo de Esp. Propaganda Asocio

aperas monate — jarabono: 3 sv. fr.

Red. kaj Adm.:

Esp.-Propaganda Asocio, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Pri Nia Aldono

Ne estas nia kutimo doni aldonojn al nia gazeto. Tamen ni escepte aldonas la belegan dekspagan faldprospekton de la **Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj**. Vi vidas el ĝi, ke la miraklo pri kiu Jean Forge parolis en sia intervjuo, presita en la pasinta numero, estas vere okazinta. La nova organizaĵo konstatis tian fabele malaltan prezon por la bonega eldonprogramo, ke ni volas kredi, ke ĉiuj niaj legantoj kaptos la okazon per du manoj kaj rapidos sendi sian AELA-aligon al la loko, por ili plej facila. Ja la sola Enciklopedio de Esperanto valoras multe pli, ol la tuta kotizo!

Se vi ne havas sufiĉe da mono, vi certe bone eluzos la partopagan sistemon, aŭ vi aliĝos kune kun viaj amikoj komune. Ni nur atentigas vin, sendi la aliĝilon kaj la unuan partopagon antaŭ la 2-a de februaro, por bone eluzi la plej favoran kotizon.

NI REKOMENDAS !!

- « **SINJORO LAŬDATA** » — 200 paĝoj — 0.50 Us. Dolaro. Poemoj, prozoj, frazoj de ĉiulandaj pacamantoj. Dua eldono kun duobligita enhavo.
- « **La Konfliktoj en Manĉurio kaj Ŝanhajo** » — 50 paĝoj, 12 bildoj — 2 resp. kuponoj. Neniu povas neglekti la plej gravan eventon en 1921.
- « **FUNDAMENTO DE ANIMO** » — 50 paĝoj — 2 resp. kuponoj. Ĉiu vidas kaj scias materion, do samtempe ĉiu devas legi kaj scii ĉion pri animo.
- « **UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO** » Kio estas UHA? Por doni ĝian aspekton ni ĵus pretigis la broŝuretojn en Esperanto, angla kaj franca lingvoj. Postulantoj ricevos ĝin senpage.

Mendu ĉe :

Administracio de OOMOTO, Kameoka Kioto-hu Japanujo.

Jus aperis la

TEKNIKA MEDICINA VORTARO

de D-ro Briquet

360 paĝoj, tole bindita. Enhavas 3675 radikojn kun necesaj klarigo en Esperanto kaj traduko en diversaj lingvoj.

Eldonita de INTERNACIA MEDICINA REVUO,
255, avenue Longchamp, Uccle, Bruxelles (Belgujo).

Prezo : 2 usonaj dolaroj.

THE TEMPLE ARTISAN

Repleted with helpful teachings anent the great problems of Life.

Sample copy on application!

Address :

The Temple Artisan, Halcyon, California, U.S.A.

